

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Europanto:
La lingvo kiu
kreskis el ŝerco**



**Membraro:
Ĉu kresko aŭ
stagno?**



**Dua Nitobe-
simpozio, en
Berlino**



Malkovri movadan Tanzanion

Vi trovos...

61 Malferme

Al libera merkato en UEA

Osmo Buller

62 LA UNUA VOJAGO AL AFRIKO

Heidi Goes - Belgio

*"Mi spertis ke
vizito de
eksterlandano
vigligas la
studemon."*



Heidi Goes



64 Interjuo

**"Mi ne estas
Zamenhof!" aŭ
Las Adventures
van doctor
Europanto**

66 LA MEMBRARO DE UEA EN 1998

67 Eksteraj rilatoj

Ne resti flanke de iniciatoj

*Laŭ raporto de Vincent Charlot
kaj Kep Enderby*

68 Konferencoj

Komputado ŝanĝas ĉion

D-ro Marc van Oostendorp



69 Dua Nitobe-Simpozio

Hans Erasmus

70 REAGJOJ



71 Forumo

Politikaj elitoj ade fiaskas

Wolfgang Gunther - Germanio

72 RECENZOJ

Kees Ruig pri

Vastas la mondo, multas laboro

Humphrey Tonkin pri

Durankulak

Kalle Vilbaste pri

Falantaj muroj kaj aliaj rakontoj

Mauro Nervi pri

Tri rakontoj pri la Miljara Paco

Mao Zifu pri

Karnavale

75 LASTE APERIS FOLIUME

Kaj plue...

76 Fake

77 Loke

78 Influe

80 Forpasoj

La kovrilo: E-istoj de Pangani,
Tanzanio. (Heidi Goes)

Dekstra paĝo: Geknaboj el la
brazila bieno-lernejo Bona Espero.
(Zorge de Ursula Grattapaglia)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establiĝita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informi
ĝi ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150,
1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por ĵu-
ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



AL LIBERA MERKATO EN UEA

Ĉi-numere vi trovos la statistikon pri la membraro de UEA en 1998. Verŝajne ĉiu rigardas en ĝi unue la sumon de la individuaj membroj, kiu ja estas la plej grava el ĝiaj informoj. Ĉi-foje estas agrable rigardi ĝin, ĉar ĝi kreskis de la antaŭa jaro. Tamen, ne indas multe ĝoji pri la pli granda cifero, ĉar ĝin kaŭzas nur tio ke en 1998 la UK estis multe pli granda ol en 1997. Ankaŭ la ĉi-jara UK estos granda, tamen malpli ol pasintjare. Do, nia venonta statistiko tre verŝajne registros falon, kaj estas duba ĉu la individuaj membroj nombros plu — kiel jam de 12 jaroj — pli ol 7000. En la dektria jaro ni riskas resti sub tiu magia limo.

Ekde la Jubilea Jaro 1987 la nombro de individuaj membroj restas esence sama. Ilia konsisto tamen daŭre ŝanĝiĝas — malkreskas la proporcio de unuamondanoj: 70,7% (5091) en 1988, 68,9% (5007) en 1993 kaj 64,3% (4732) en 1998. Lastatempe tiu evoluo eĉ emas plirapidigi.

UEA estas do ĉiam pli tutmonda, kio ja ĝojigas nin. La sekvoj tamen serioze maltrankviligas, ĉar temas nur pri redistribuo de sama membronombro. Tia tutmondiĝo estas finance pli kaj pli peza. La kotizoj por la malriĉaj landoj estas duono de tiuj por la riĉaj landoj, kvankam la sendokostoj al la landoj ekster Eŭropo estas konsiderinde pli altaj. Ni iras laŭ kontraŭdira vojo: la membraro malkreskas en landoj kiuj pagas

pli altajn kotizojn, kaj ĝi kreskas en landoj kiuj kaŭzas pli altajn kostojn. Neil Salvesen, la tiama direktoro de la CO, titolis siajn komentojn pri la statistiko 1988: “Stabileco ne sufiĉas”. Li estis pli ol prava: stabileco tia kia ĝi estis de post tiam, estas danĝera.

Por ke la membraro en malpli riĉaj landoj povu kreski, ankaŭ en riĉaj ĝi devus turniĝi en kreskon. Potencialo ne mankas: sole la sporadaj aliĝantoj al UEA estas ĉ. 3000. Jam de longe ni admonas niajn perantojn ne nur pasive peri kotizojn sed aktive varbi. El admonoj rezultis nenio. Eĉ konkurso por la oficialaj perantoj pasintjare — kun monpremioj! — ne vekis ilin. Kelkaj perantoj agas ja laŭinde, sed kiel tuto la sistemo de oficialaj perantoj fariĝis fosilia barilo.

En kelkaj landoj UEA eksperimente jam havis du perantojn. La spertoj kuraĝigas nin liberigi la kotizmerkaton ĉie. Estas ja absurde ke la perado de UEA-kotizoj estu ies monopolo. Tio eble ne plaĉas al tiuj landaj asocioj por kiuj la perado de UEA-kotizoj estas fonto de enspezoj. Konkurenco kun entreprenemaj individuoj kaj aliaj asocioj, kiuj pretos varbi membrojn por UEA, devus tamen sproni ankaŭ la landajn asociojn al pli vigla varbado. Krome, pli forta UEA estas ankaŭ en ilia intereso. Pasiveco estas peko kiun oni ne povas absolvi, eĉ kiam temas pri landa asocio de UEA.

Osmo Buller



Afriko: Kontaktoj, tro maloftaj,


La unua vojaĝo al Af

Heidi Goes - Belgio

Studvojaĝante en Tanzanio, belga studentino spertis ke en afrika lando Esperanto ofte sinonimas kun viv-plibonigaj klopodoj.

Kvankam jam tri jarojn mi studis lingvojn kaj kulturojn de Afriko en la universitato de Gento, mi ankoraŭ neniam vojaĝis al tiu kontinento. Sciante preskaŭ nenion pri la Esperanto-movado en Afriko, mi decidis pristudi ĝin. Sekvis la decido viziti la samideanojn en Tanzanio, kie mi volis samtempe iom praktiki la svahilan, por grandigi mian etan lingvokonon.

La movado de Tanzanio — gastiginta la Kvaran Afrikan Kongreson en 1995 (vd. feb. '96, p. 21) — estis iam nomita la plej vigla en Orienta Afriko. Ĉu ĝi ankoraŭ estas tia? Mi devis atendi la respondon ĝis kelkajn tagojn post la



Boato sur la rivero Pangani

Virina agado interkontinenta

En Japanio 11 esperantistoj fondis Kokosan Klubon, kiu kunlaboras kun tanzaniaj esperantistoj.

Ĉio komenciĝis en 1995, kiam, post partopreno en Tutmonda Virina Konferenco en Pekino, AIHARA Misako kun aliaj japanaj e-istinoj fondis la grupon Esperanta Virina Agado. Pro ĉi-tema notico en nia revuo (dec. '95, p. 217) skribis al ili s-ino Mwajuma el Pangani (Tanzanio), petante helpon por Pangani Virina Esperanto-Grupo (PVEG). Printempe de 1997 AIHARA Misako kaj SAITOO Cume flugis al Tanzanio por "rigardi la urbon kaj aŭskulti aferojn". En Pangani, kampara urbo kun 30 mil loĝantoj, ili loĝis en preĝejo, laŭ aranĝo de la lokaj esperantistoj.

PVEG konsistas el 12 membroj, plejparte bazlernejaj instruistinoj kaj oficistinoj de la urbodomo. Eklerninte Esperanton antaŭ ĉ. unu jaro, ili interkonsiliĝis kun la japaninoj helpate de la loka delegito, E-instruisto Charles K. Hiza. La PVEG-anoj planas produkti kaj vendi populajn artaĵojn, aĉeti maŝinojn por rafini kokos-oleon vendotan surloke, establi tranoktejojn de studentinoj kaj virinajn kunvenejon.

Reveninte hejmen, la du japaninoj fondis Kokosan Klubon. Ĝi jam produktis bildkartojn, kies Montpeliera vendenspezo helpas la projektojn en Pangani. Kontakto s-inon AIHARA Misako (delegito en Tiba): Satuki-sô 7, Tuga 3-15-13, Wakaba-ku, Tiba-si 264-0025, Japanio; ☎ +81/43/232-48-78. (Laŭ Novaĵoj Tamtamas)

UK en Montpeliero, kiam mi ekflugis al la tanzania ĉefurbo Dar-es-Salamo.


Mi bone alvenis, sed ne povis trovi samideanojn, ĉar iliaj adresoj estas nur poŝkestaj numeroj. Tial mi decidis, post kelkaj agrablaj tagoj sur la "herbinsulo" Zanzibaro, unue viziti esperantistojn en malgrandaj urboj aŭ vilaĝoj, kie mi povus pli facile trovi ilin. Kaj mi pravis: jam en la buso troviĝis iu kiu konis Leonardon Sekibaha, esperantiston el la urbo Pangani.

Por virina memstariĝo

Tie, ne longe post la elbusiĝo, mi renkontis lin: pro nia korespondado li tuj sciis kiu mi estas. Ni eniris la domon, kie mi konatiĝis kun liaj edzino kaj gefiloj. S-ino Sekibaha estas komencanto, kiel la plej multaj membroj de la Pangani Virina Esperanto-Grupo. Ili volas ne nur lerni Esperanton, sed ankaŭ agadi por la memstariĝo de tanzaniaj virinoj. Tial ili kune fabrikas manfaraĵojn por vendi. Tiuj kiuj volus aĉeti ion aŭ alimaniere helpi aŭ kuraĝigi, kontaktu ilin je la adreso: s-ino MWAJUMA Rashid, Pangani Primary School, P. O. Box 77, Pangani Tanga, Tanzanio.

Mi restis tri tagojn en la vilaĝo, kaj dume ili plenumis miajn demandojn, bezonatajn por mia studverko. Mi ankaŭ intervjuis kelkajn gravulojn de la du kluboj (vira kaj virina), i.a. Charles K. Hiza, la alportinton de Esperanto al Pangani, kiu jam vizitis Eŭropon.

riko



Heidi Goes
kun esperantistoj
en Bunda

Studemo vigliĝas

Survoje al la urbo Mwanza, mi vizitis izolitan esperantiston, Yusuf Gumbo. Li ne plu bone parolas la lingvon, pro studtempo-manko, sed promesis denove eklerni ĝin. Ankaŭ ĉe aliaj esperantistoj mi spertis ke vizito de eksterlandano vigligas la studemon.

En Mwanza mi rimarkis ke plejparto de la lernantoj de Ambrose Polle estas komencantoj, sed kelkaj certe baldaŭ iĝos progresantoj. Aliaj diras ke ili ne havas tempon por studi, ĉar ili devas serĉi monon por vivteni sin kaj la infanojn; foje ili eĉ ne certas pri sia ĉiutaga manĝo. Tio estas problemo de multaj el niaj samideanoj en Tanzanio kaj certe ankaŭ en la cetera Afriko.

Ambrose Polle - Heidi Goes

Mi postlasis en Mwanza miajn demandarojn, kaj jam la postan tagon denove enbusiĝis, ĉi-foje al Bunda, kie loĝas vaste konata samideano, Mramba Simba, prezidinto de Tanzania E-Asocio. Kun la komencanto Max Madoro kaj aliaj samvilaĝanoj, li starigis neregistaran organizaĵon, Esperanto Orientado-Programo. Ili volas fondi sano-centron D-ro Zamenhof, ĉar en tiu regiono ne ekzistas sufiĉe proksima malsanulejo. Ili atendas (adreso: E.O.P. S.L.P. 51 Bunda-Mara, Tanzanio) ĉian helpon de unuopuloj kaj ŝtataj ministerioj.

Repasinte tra Mwanza, mi enbusiĝis direkte al Kahama, kie ĉiuj estas komencantoj, eĉ la instruanto; do mi proponis ke ili sekvu korespondan kurson de Brita E-Asocio. Ofte en Tanzanio mankas bonaj instruistoj. Kelkaj volas instrui tro frue, post nesufiĉa propra lernado, aŭ, kiuj ja sufiĉe lernis, ne plu havas tempon por regule instrui.

Post Kahama sekvis Tabora, kie mi bedaŭrinde malsaniĝis. Multaj nunaj esperantistoj tanzaniaj lernis Esperanton en Tabora, sed nun restas nur kelkaj.

Post 28-hora trajnvojaĝo finiĝis mia rondvojaĝo. Dum kelktaga restado en la ĉefurbo mi ĉi-foje povis trovi samideanojn, laŭ indikoj ricevita en Mwanza. Costantine Mashauri kunvenigis ilin, kaj tiel mi faris la lastajn intervjuojn antaŭ ol reflugi al Belgio. Tutkoran dankon al ĉiuj kiuj helpis min en Tanzanio! ★

Bonvenon al Mwanza

En la historio de Pacamanta Esperanto-Rondo (PER) de Mwanza gaja momento estis la 24-a de aŭgusto 1998, kiam alvenis al ni Heidi Goes.

En la flughaveno neniu atendis ŝin, sed post malsimpla serĉo ŝi atingis la hejmon de la esperantista familio Bitoro. Heidi petis renkonti ankaŭ pli spertajn parolantojn. Tio montriĝis nefacila, ĉar la plej kapabla loka E-parolanto tiam rigardis futbalmatĉon inter Dynamo de Zimbabvo kaj Eagle Cement de Niĝerio, kaj poste alian inter ASEC Mimosas de Eburia Bordo kaj Casablanca de Maroko, ĝis

la 10-a vespere. La serĉato estis mi. Trovite, mi rekte iris al ges-roj Bitoro, el kies fenestroj aŭdiĝis gaja babilado. Mi konatiĝis kun Heidi Goes. Ni vikle kaj gaje babilis plu, kvar horojn aŭ pli, planante vizitojn kaj intervjuojn.

La 27-an de aŭg. Heidi intervjuis lokajn e-istojn en la hejmo de ges-roj Bitoro. Ĉeestis multaj PER-anoj, i.a. prezidanto Nyakali Kubi Nyakali, kaj e-isto nekonata al ni, Zephania F. Sasitta. Ni esperas ke ni kontribuis al la esplorklaboro de Heidi Goes kaj kun granda intereso atendas ŝiajn eltrovaĵojn.

Ambrose F. Polle - Tanzanio

"Mi ne estas Zamenhof!" aŭ

Las Adventures van doctor Europanto

■ Kara Diego, vi certe estas la plej konata tradukisto de la Konsilio. Via Europanto naskiĝis kiel privata ŝerco, en interna bulteno de EU-oficistoj, sed nun ĉiuj parolas pri ĝi. Kion vi vere celas per ĝi?

Kiel vi diras, ĝi komenciĝis kiel ŝerco kaj estas plu ŝerco. Mi neniam ambiĉis-per-versiis eltrovi novan lingvon. Jam estas tro multaj, naturaj kaj artefaritaj. Europanto estas ludaĵo, rezulto de persona scivolo kaj eksperimentado. Studinte plurajn lingvojn, mi demandis min: "kio okazus se mi kunmetus tion kio estas jam komuna?"

■ Kiel vi provis fari tion? Vi tamen bezonis ian bazan gramatikon, ĉu?

En si mem, Europanto ne obeas al reguloj, ne havas gramatikon. Mi ĉerpas miajn vortojn laŭ la bezonoj, de tag' al tago, dum mi verkas. Mi povas fari kion mi volas per miaj vortoj: kunmiksi, kunmeti ktp. De *hooligan*, ekzemple, mi eltiris particon: *hooligananta*, "konduanta kiel huligano". Mi ne konscie celas al kohereco, kvankam ju pli mi verkas, des pli mi kutimiĝas al iuj elektoj. En miaj kapo kaj plumo disvolviĝas sama stabila proceso kiel en naturaj lingvoj. Eble psiĥiatro pli kompetentus por esplori tion! (*ridas*)

■ Ĉu vi vere tute malhavas fiksan fundamenton?

Nu, fakte mi uzas ian anglecan skeleton, almenaŭ morfologian: *-ed* por la preterito, *could*, *would* por kondiĉa modo ktp. Tre baza scio pri la angla sufiĉas por kompreni, ĉar mi elektis laŭeble radikojn komunajn. Ekzistas tuta stoko da "vortoj sen limoj", tuj komprenataj de ĉiu eŭropano, kiel *chacha-cha*, *buffet*, *bazooka*, *blitzkrieg*, eĉ *Heil Hitler*! Sur tiu nekredible riĉa heredaĵo eblas plu konstrui, kiel mi diris pri *hooligan*. Krome, multaj latinaj radikoj estas kaŝe internaciaj. Ekzemple, la latina radikoj *juven-*, cetere ne malsimila al la ĝermana *jung-jong-young*, estas konata pro la angla vorto *juvenile* eĉ al tiuj kiuj ne studis la latinan. Ja ĉiu eŭropano iom lernas la anglan nuntempe, pro laboro...

■ Kial do vi ne verkas angle?

Nu ja, tio ne estus amuza. Mi devus skribi korekte, atenti pri gramatiko, idiomeco... Mi scipovas sufiĉe la anglan — kaj aliajn lingvojn — por scii ke tio tute ne facilas. Certe ne estus distre — kaj Euro-

No Est Known
Lingua Aber Du
Understande, Eh?

"Que would happen if, wenn Du open your computer finde one message in esta lingua? No es Englando, no est Germano, no este Espana, no est keine known lingua aber Du Understande!" No, this isn't some kind of garbled translation program. It's a message in Europanto, a linguistic amalgam created by Diego Marani, a translator for the European Council of Ministers in Belgium. Mr. Marani figured that if Europe could come up with a single currency, why not a single language? European Union members often communicate in English even though it is not the native language of most members. "It is intended to give voice to the frustrations of the vast majority of people who are forced to use English," he said, "even though their command of the language is not very good." So he wants to "europantize" English. After all, he notes, "there are many words such as *blitzkrieg*, *pizza* and *leitmotif* that everybody understands."

A native of Italy, Mr. Marani conceived Europanto while observing the language wars in Belgium and listening to the polyglots at the Council of Ministers in Brussels struggling to find a common tongue.

La gazetaro en kaj eĉ ekster Eŭropo parolas pri Europanto, "nova eŭropa lingvo" lanĉita de Diego Marani, tradukisto ĉe Konsilio de Eŭropa Unio. La nomo Europanto — kvankam, laŭ Marani, derivita de "Eŭropo" kaj de *panto* ("tuta, ĉio" en la greka) — nerezisteble pensigas pri Esperanto. Ĉu mallojala konkurenco? Angelos Tsirimokos, longtempa membro de UEA kaj mem tradukisto, intervjuis kolegon Marani, franclingve, la 8-an de marto en Bruselo.

panto por mi estas ĝuste ludo, distraĵo! Mi ĝuas ĝin, mi ŝatas improvizi en ĝi. Se ankaŭ aliajn ĝi distras, plezurigas, tiom pli bone.

■ Ĝi ne nur distras: iuj ŝajnas trakti Europanton serioze.

Efektive, la afero eskapis el miaj manoj, alprenis dimensiojn neniam antaŭviditajn.

■ Kiel vi klarigas tion?

Parte per ĝia humureco. Europanto amuzas, kaj tio instigas al iom da klopodo ĝin kompreni. Eĉ homoj lingve ne tre spertaj pretas al iom da fortostreĉo por deĉifri Europanton, ĉar la rezulto rid(et)igos ilin.

■ Vi diris "parte". Kio alia rolas?

Nu, ŝajnas al mi ke mi trafis iun veran bezonon. Ju pli la unuiĝo de Eŭropo progresas, des pli oni sentas ankaŭ la bezonon de komuna esprimmaniero.

I THINK IANK
K. Aleusa Dilday



"The Tower of Babel," a copy by Pieter Bruegel the Younger.



Komplezo de Angelos Tsirimokos

was that was I
tained in Irish
book, "Serenad
"

LA MEMBRARO DE UEA EN 1998

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Albanio	0	18	18	Kubo	100	46	146
Alĝerio	0	2	2	Kuvajto	0	1	1
Angolo	0	3	3	Latvio	81	21	102
Argentino	110	68	178	Libano	0	3	3
Armenio	30	15	45	Libio	0	1	1
Aŭstralio	171	74	245	Lihtenŝtejno	0	1	1
Aŭstrio	43	51	94	Litovio	78	64	142
Azerbajĝano	0	1	1	Luksemburgio	94	13	107
Bangladeŝo	0	1	1	Madagaskaro	15	12	27
Barejno	0	1	1	Makedonio	45	12	57
Belgio	505	191	696	Malajzio	0	2	2
Belizo	0	1	1	Malto	42	3	45
Benino	0	8	8	Maroko	0	1	1
Bjlorusio	0	19	19	Meksiko	22	12	34
Bolivio	0	5	5	Moldavio	0	3	3
Bosnio-Hercegovino	50	44	94	Mongolio	0	5	5
Brazilo	223	511	734	Nederlando	345	356	701
Britio	580	229	809	Nepalo	0	9	9
Bulgario	140	65	205	Niĝerio	0	23	23
Burundio	0	1	1	Nikaragvo	0	4	4
Ĉeĥio	167	129	296	Norvegio	316	76	392
Ĉilio	25	5	30	Nov-Zelando	37	33	70
Ĉinio	970	190	1160	Pakistano	50	15	65
Danio	131	93	224	Panamo	0	2	2
Ebura Bordo	25	5	30	Papua Novgvineo	0	1	1
Egiptio	0	4	4	Paragvajo	0	1	1
Ekvadoro	0	2	2	Peruo	25	6	31
Estonio	24	49	73	Pollando	240	172	412
Filipinoj	0	4	4	Portoriko	0	1	1
Finnlando	232	246	478	Portugalia	274	19	293
Francio	412	894	1306	Ruando	0	1	1
Ganao	0	5	5	Rumanio	100	101	201
Germanio	1017	602	1619	Rusio	80	228	308
Greklando	272	26	298	Salvadoro	0	1	1
Gvatemalo	0	5	5	Samoo	0	1	1
Haitio	15	1	16	San-Marino	0	1	1
Hinda Unio	100	20	120	Saŭda Arabio	0	3	3
Hispanio	320	190	510	Senegalio	0	7	7
Hungario	348	116	464	Sirio	0	1	1
Indonezio	0	3	3	Slovakio	207	38	245
Irako	0	1	1	Slovenio	84	24	108
Irano	21	73	94	Srilanko	0	3	3
Irlando	50	13	63	Sud-Afriko	49	10	59
Islando	54	36	90	Svedio	766	226	992
Israelo	139	71	210	Svislando	77	141	218
Italio	860	259	1119	Tagikio	0	2	2
Japanio	1048	415	1463	Tajlando	0	1	1
Jugoslavio	130	59	189	Tanzanio	0	9	9
Kamboĝo	0	2	2	Togolando	25	26	51
Kamerunio	0	6	6	Tunizio	0	2	2
Kanado	123	73	196	Turkio	0	4	4
Kartvelio	0	7	7	Ukrainio	121	44	165
Kazahio	0	6	6	Urugvajo	30	8	38
Kenjo	0	3	3	Usono	480	400	880
Kolombio	50	20	70	Uzbekio	0	6	6
Komoroj	0	1	1	Venezuelo	10	18	28
Kongo, Dem. Resp.	50	10	60	Vjetnamio	100	38	138
Kongo, Pop. Resp.	0	2	2	Zambio	0	1	1
Korea Resp.	204	43	247	Zimbabvo	0	1	1
Kostariko	0	9	9				
Kroatio	250	89	339	120 LANDOJ	12782	7359	20141

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

Kategorio	1997	1998
Membro-Gvidlibro	452	435
Membro-Jarlibro	1337	1859
Membro-Abonanto	3504	3405
Juna Membro-Jarlibro	598	451
Juna Membro-Abonanto	277	260
Dumviva Membro	867	859
Juna Dumviva Membro	17	17
Honora Membro	58	61
Honora Patrono	12	12

INDIVIDUAJ MEMBROJ 7122 7359

Aligitaj membroj	10523	10853
Junaj aligitaj membroj	2512	1959

MEMBROJ ENTUTE 20157 20171

Societo Zamenhof	242	224
Abonoj <i>Esperanto</i>	207	195
Kolektivaj ab. <i>Esperanto</i>	61	121
Abonoj <i>Kontakto</i>	443	405
Kolektivaj ab. <i>Kontakto</i>	602	465
Patronoj de TEJO	101	100
Dumvivaj Patr. de TEJO	12	13

KOTIZOJ ENTUTE 21825 21694

En 1998 la nombro de individuaj membroj (IM) kreskis entute je 237. Unuafajaj membroj estis 482 (7,5% de la kategorioj nekonstantaj), dum 971 personoj (15,1%) renovigis sian IM-membrecon post jaro(j) da interrompo. Imponas la kresko de Membroj kun Jarlibro (+552; 39%), sed nur pro la aliĝo de 575 UK-anoj kiuj ne membris en la antaŭa jaro. Ne granda sed zorgiga estas la perdo de Membro-Abonantoj (-116; -3,1%), ĉefe en pli riĉaj landoj. TEJO malhavis 164 IM (-18,7%), precipe pro malpli da kotizoj kolektitaj dum IJK.

Francio elstaras pro la plej granda kresko de IM (+234; 35,5%). Ĝin sekvas Pollando (+54; 45,8%), kie eklaboris novaj perantoj. Italio ne sukcesis reteni la pasintjaran kreskon (+31) kaj perdis 41; negativis la rezulto ankaŭ en Koreio (-23; -34,8%), Svedio (-26; -10,3%) kaj Germanio (-24; -3,8%).

La nova landa asocio de Slovakio kontribuis al la statistiko de aligitaj membroj (AM) per 207 individuoj. La fina sumo de AM estis tamen negativa (-223) kun rimarkinda falo de la junulara parto (-553). Novaj en la landolisto estas Burundio, Irako, Komoroj, Samoo kaj Zambio.

pz

Ne resti flanke de iniciatoj

UEA-prezidanto Kep Enderby daŭrigas la diplomatajn tradiciojn de sia antaŭulo LEE Chong-Yeong: dum eŭropa vojaĝo li flegis kontaktojn en Parizo kaj Bruselo.

Kun Vincent Charlot kaj François Lo Jacomo, reprezentantoj de UEA resp. de ILEI ĉe Unesko, Kep Enderby vizitis plurajn Unesko-respondeculojn en Parizo la 22-an kaj 23-an de marto.

Monique Fouilhoux, nova prezidantino de la Konsilio de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j), detale informis pri la starigo de diversmaj komisionoj, kies celo estas pli firme enplekti NRO-jn en la agadon de Unesko. Enderby anoncis la kunlaboron de UEA en la komisiono pri homaj rajtoj.

Sekvis vizito al Joseph Poth, direktoro de la Lingva Fako, ĉeestinta en la Praga UK (1996), al kiu oni

prezentis la komunan projekton de UEA kaj ILEI, Interkulturo, kies franc-lingva laborplano pretiĝis ĝustatempe antaŭ la vizito de nia delegacio. Per sia projekto UEA kaj ILEI kontribuas al la Linguapax-projekto de Unesko. Al Interkulturo ĝis nun aliĝis 29 lernejoj el 16 landoj, kaj la nombro ankoraŭ povos kreski.

Michael Millward, ĉefo de la Fako por Rilatoj kun NRO-j, ricevis de Enderby ampleksan priskribon de la evoluo kaj stato de la E-movado. Laŭ Millward la E-movado malĝuas kelkfoje nefavoran bildon, pro la erara impresoj ke ĝi deziras altrudi Esperanton sen respekto al aliaj lingvoj. Li insistis ke UEA partoprenu — same kiel ĝi faris jam plurfoje antaŭe — ankaŭ en la venonta Ĝenerala Konferenco de Unesko (novembro 1999), aparte grava, ĉar ĝi nomumos novan Ĝeneralan Direktoron.

Ĉiuj tri interparolintoj emfazis ke plu necesas regule interkomuniki per rete, konstante legi Unesko-informojn kaj ne resti flanke de ĝiaj iniciatoj.



Ĉe Unesko en Parizo (de maldekstre): Vincent Charlot, Kep Enderby, d-ro Zapata kaj Roch Jullien.

Por la vizito al d-ro Zapata, respondeculo pri la programo Kulturo de Paco, aliĝis al Enderby kaj Charlot ankaŭ Roch Jullien kaj Robert Laureau. Zapata proponis al UEA kaj ILEI partoprenon — ekzemple per agadoj rilataj al lingvaj homaj rajtoj — en la grandaj projektoj de Unesko: Manifesto 2000, kiu enkadriĝas al la Internacia Jaro pri Kulturo de Paco (2000), kaj en Iniciato Dialogo, kiu instigas kompreniĝon per interkomunikado. Enderby informis lin ke la projekto Interkulturo kongruas kun ambaŭ kaj ke la Tel-Aviva UK estos plene dediĉita al la antaŭenigo de packulturo.

Ministeria vizito

La Alta Protektanto de la Montpeliera UK estis Marie-George Buffet, ministrino pri junularo kaj sporto. En ŝia ministerio laboras Roch Jullien, kiu aranĝis rendevuon por Enderby, Charlot

kaj Didier Loison (Junulara Franca Eista Organizo) kun Francine Meyer, sekiestrino pri internaciaj rilatoj. Ŝi substrekiis ke la E-movado ne sufiĉe montras kaj prezentas sin; kaj ke, aliflanke, la francaj registaroj kaj administracio kutimas timi ĉian lingvan iniciaton, kvazaŭ minacan al Franc-lingvio. Ŝi indikis ke ŝia ministerio ne havas tiun sintenon, kaj insistis ke eventualaj subvencipetoj kaj kunlaboroj strikte respektu la regulojn kaj la agadkampojn de la ministerio.

Ĉe UFE kaj SAT

Tri movadaj vizitoj kompletigis la Parizan programon de Enderby. Membro de SAT, li partoprenis en ties Pariza sidejo kunsidon de la Plenum-Komitato. En Choisy-le-Roi li diskutis kaj vespermanĝis kun lokaj E-grupanoj. Fine, ĉe la sidejo de Unuiĝo Franca por E-o akceptis lin ĉefdelegito Louise Marin, UFE-kasisto Jean-Louis Texier, deĵoranto Materne Schmidt Le Roi kaj Didier Loison.

Bruselaj kontaktoj

Enderby pasigis tagon en Bruselo, kie li havis utilajn kontaktojn, kune kun Hans Erasmus el la Laborgrupo pri la Lingva Problemo en Eŭropa Unio. Kun brita membro de Eŭropa Parlamento, Eryl McNally (vd. okt. '98, p. 171), ili parolis pri progresigo de la projektoj NEIGHBOUR (pri la propedeŭtika valoro de E-o) kaj Relais (pri uzo de Esperanto kiel pontlingvo ĉe eŭropaj instancoj). Okazis mallonga renkontiĝo kun Olivier Dupuis, belga membro de Eŭropa Parlamento, partopreninta la Pragan Nitobe-Simpozion, kaj vizito al la Brusela oficejo de Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj. Vespere Enderby kaj Erasmus partoprenis kunsidon de Brusela E-Grupo, kiun ĉeestis dudeko da lokaj esperantistoj.

Laŭ raporto de Vincent Charlot kaj Kep Enderby

Komputado ŝanĝas ĉion

D-ro Marc van Oostendorp

Eble la estonteco de lingvoj dependas de ilia komputila uzo — avertas la kunordiganto de la venonta Esperantologia Konferenco.

Komputiloj en la moderna mondo ne plu estas nur kalkuliloj. Ofte oni uzas ilin ankaŭ por lingve komuniki, prilabori tekstojn, prepari vortarojn, tajpi, legi, aŭdi kaj paroli. Iom dramece eblas supozi ke la estonteco de lingvoj dependas de ilia komputila uzo.

Tion montras i.a. jena ekzemplo. Grandaj entreprenoj amase produktas leterojn al klientoj kaj aliaj. Nuntempe oni provas aŭtomatigi la verkadon de tiaj leteroj. Post kelkaj jaroj la oficeja korespondanto eble bezonos nur prononci la nomon de la kliento kaj la kategorion de ties problemoj por aŭtomate produkti adekvatan leteron. Post tio la oficisto bezonos nur voĉe klarigi la detalojn al sia komputilo: eĉ tajpado estos nenecesa.

La entreprenoj ŝparos multe da mono per tiaj komputilaj programoj. Tial oni nun vidas grandan intereson pri ili ĉe la programistoj. Ĉi tie kuŝas grava danĝero por malgrandaj lingvoj. Tiaj programoj estos ekproduktataj nur en grandaj naciaj lingvoj, precipe la angla. Tio siaflanke eble estos argumento por entreprenoj uzi nur tiu(j)n lingvo(j)n en sia ekstera komunikado. Pli malmulte kostos produkti leteron angle ol eĉ en la nacia lingvo de la oficisto. Ankaŭ Esperanto suferas malavantaĝon: dum oni inves-

tas miliardojn da eŭroj por produkti anglalingvajn ilojn, neniam la esperantistoj trovus eĉeron de tiu sumo.

La komputilado ankaŭ ŝanĝos la esploradon de lingvoj kaj de literaturo. La ekzisto de grandaj tekstaroj, ekz. en Interreto, de komputilaj vortaroj



kaj gramatikoj verŝajne ŝanĝos la labormetodojn de multaj lingvosciencistoj. Estos multe pli simple pristudi kiel lingvo vere funkcias uzante komputilojn kaj komputilajn retojn. Ankaŭ tio ke multaj eldonistoj prilaboras elektronikajn dosierojn, povos forte helpi esperantologon, se ni sukcesos iel fari tiujn dosierojn alireblaj por esploristoj. Krome, ankaŭ la publikigado de tiel akiritaj rezultoj estos multe pli facila kaj pli malmultekosta, se oni uzos elektronikajn forumojn.

La E-movado kaj la esperantologio

tial ambaŭ devas ekuzi la novajn rimedojn. Feliĉe, la nombro de interesatoj pri komputila lingvistiko inter la esperantologoj estas tradicie relative alta, kaj krome ankaŭ multaj aliaj projektoj ne tradicie komputilecaj ekzistas:

— la ekrevivanta revuo *Esperantologio/Esperanto Studies* aperos ne nur papere sed ankaŭ en Interreto (vd. jan., p. 18);

— grupeto da homoj entajpadas la korespondadon inter Kalocsay kaj Waringhien kaj metas ĝin en formon kiu ebligas sciencan pristudadon;

— en la sama Interreto jam floras forumoj, de la ĝeneraltema "soc. culture.esperanto" ĝis la pli specialistaj "bja-listo" kaj "denask-l". Eventualaj arkivoj de tiaj grupoj povus servi kiel valora fonto por lingvistikaj studoj;

— multaj surpaperaj revuoj kaj libroj estas jam produktataj elektronike; ankaŭ iliaj elektronikaj arkivoj estus valoraj por la esperantologio, kaj tial konservindaj.

En la ĉi-jara Esperantologia Konferenco, dum la Berlina UK, ni pristudos la demandon kio estas farenda, farinda kaj farebla por plibonigi la elektronikan vojstrukturon de la lingvo. Kiel arkivigi la ekzistantajn materialojn? Kiel profiti de ili? Kiel ni povos stimuli Esperantan lingvoteknologion?

Fakuloj kiuj volas kontribui al la konferenco sendu kelklinian resumon por prelego 30-minuta — entute ni akceptos ĉ. 6 tiajn prelegojn — al dr. Marc van Oostendorp, Vakgroep Theoretische Taalwetenschap, Universiteit van Amsterdam, Spuistraat 210, 1012 VT Amsterdam, Nederlando; aŭ (prefere) al oostendorp@rullet.leidenuniv.nl, en ASCII-formato.

Pola Radio ret-sendas tutmonden

Koincide kun sia 40-jariĝo (la 4-an de apr.), la restrukturitaj Esperanto-elsendoj de Pola Radio fariĝis — por uzantoj de Real Audio — tutmonde aŭdeblaj. Ŝatantoj de ret-radio povas nun kiam ajn aŭskulti la premieran elsendon (30 min., ĉiutage je 13.30*). Jen la horoj kaj frekvencoj:

Premiero: 13.30 — 7285 kHz, 7225 kHz (bendo 41,18 m; 41,52 m);

Reaŭdigoj: 18.00 — 6095 kHz, 7205 kHz (bendoj 49,22 m; 41,64 m); 6.00 kaj 8.30 en la sekva tago, per satelito Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.476 Ghz Hpol (Tv Polonia), 7.38 MHz;

Real Audio: <http://www.wrn.org/audio/html/>.

TTT-paĝo pri Esperanto en Radio: <http://osiek.org/aera/>

La prezidanto de UEA, Kep Enderby, gratule mesaĝis al Pola Radio: "...mi apenaŭ povus imagi pli bonan donacon okaze de via 40-a datreveno: plenampla programo en Interreto!"

*ĉiuj horoj laŭ monda tempo

ĈU VI SERĈAS

KORESPONDAMIKON?



Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* (B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio) jenajn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj, pri kio. Almetu du internaciajn respondopunojn. *KSM* transdonos viajn informojn al korespondemulo konforma al via deziro. Vi ricevos rektan respondon.

KSM

Dua Nitobe-Simpozio

Hans Erasmus

La dua Nitobe-Simpozio, dum la UK en Berlino, denove celos ĝeneralan konsciigon pri la lingvoproblemo.

Sepdek kvin jarojn post kiam d-ro NITOBĖ Inazō, asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj, partoprenis la 13-an UK en Prago (1921) kaj raportis pri Esperanto al la Ligo, en 1996 Prago gastigis la unuan Nitobe-Simpozion de Internaciaj Organizaĵoj. La dua Nitobe-Simpozio, pri "Tutmondiĝo kaj lingva diverseco", okazos lige kun la 84-a UK en Berlino, la 2-an kaj 3-an de aŭg. Kongresanoj povos aŭskulti la prelegojn kaj diskutojn.

La simpozio denove ĉefe celos ĝeneralan konsciigon pri la lingvoproblemo. Lingvaj egaleco, diverseco kaj demokratio, respekto al lingvaj rajtoj, efikeco, pli bona komunikado: por tiuj principoj politikistoj oficiale pledas.

Sed en la praktiko pli kaj pli regas la angla lingvo. Necesas daŭre atentigi politikistojn, oficistojn kaj internaciajn instancojn pri tiu situacio, postulanta pli logikan solvon.

Ni invitis prelegi eminentajn lingvistojn kaj konatajn politikistojn (grandparte neparolantojn de Esperanto). Jam akceptis la inviton la lingvistoj Ulrich Ammon, Rainer Arntz, Florian Coulmas, Robert Phillipson, Claude Piron, Tove Skutnabb-Kangas, kaj Bojan Brezigar, prezidanto de Eŭropa Burao por Malpli Uzataj Lingvoj.

Por instige nutri la debatojn, ĉiu leganto povas helpi la preparojn, respondante al la demando: "Ĉu vi konas nuntempajn ekzemplojn de avantaĝoj kiujn havas denaskaj parolantoj de iuj lingvoj, kaj de malavantaĝoj kiujn havas parolantoj nendenaskaj?"

Ekzemple: Opinianta ke plej bone vendiĝas filmoj anglalingvaj, filmproduktanto dungas aktorojn kiuj regas la anglan perfekte (plej ofte do denaske); sekvas mallaboro por aktoroj propralantaj. Ni atendas *konkretnajn, dokumentitajn* ekzemplojn, kiujn ni kompilos por uzo en la simpozio kaj publikigo en ties aktoj. Sendu al: Hans Erasmus, Laan van Oostenburg 40, NL-2271 AP Voorburg, Nederlando; erasmusz@worldonline.nl.



PRI LINGVAJ RAJTOJ, TRILINGVE:

Al lingva demokratio / Towards Linguistic Democracy / Vers la démocratie linguistique. Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Trilingva. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. 24cm. € 10,20.

La baza gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo:

metodiko de la esperanto-instruado

de Rudolf Rakuŝa (1893-1970)

Temas pri 3-a eldono de la verko unue aperinta en 1957 kaj kompletigita en 1970.

189p. 20cm. ISBN 92 9017 045 X. Prezo: € 6,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Pri la vjetnama milito en Hanojo

Kadre de la 2-a Azia Kongreso en Hanojo (22-25 aŭgusto), la Esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio (vd. nov. '97, p. 187) organizos sian 4-an simpozion pri rilathistorio, ĉi-foje pri la vjetnama milito.

La kunsidanoj ririgardos al la milito laŭ preparita dokumento, studante i.a. kion esperantistoj faris rilate al ĝi; komparos priskribojn de la milito en naciaj lernolibroj, kaj interŝangos proprajn spertojn pri la milito. Estas petata aktiva partopreno precipe el la koncernaj landoj: Vjetnamio, Usono, Japanio, Koreio kaj Ĉinio.

Kontaktu: Nisio Tutomu, Takadono 4-13-3, Asahi-ku, Oosaka-si, 535-0031 Japanio; ☎+81/6/69-58-25-03; 📠69-58-25-04; 📧tomtom@ann.hi-ho.ne.jp.

UEA kandidato por Hilton-premio

La milion-dolara Humaneca Premio de Hilton, kiun aljuĝas Fonduso Conrad N. Hilton (fondita de la fama hotel-entreprenisto), estas la plej granda humaneca premio en la mondo. Lastatempe ĝin ricevis i.a. Kuracistoj Sen Limoj kaj Operacio Rideto.

Laŭ iniciato de Kent Jones (Usono), ĉi-jare ankaŭ UEA kandidatas por tiu premio, kies aljuĝon oni anoncos en novembro. La premio honoras "volontulan, karitatan aŭ ne-registaran organizaĵon kiu eksterordinare kontribuis al la mildigo de homa sufero". En unua ekzameno la Fonduso trovis ankaŭ la sufer-preventan agadon de UEA kongrua kun la celoj de la premio (ĉar internacia lingvo kontribuas al anticipa mildigo kaj forigo de sufer-kaŭzoj), kaj sekve UEA estis akceptita kiel kandidato. Kun la traduka helpo de William Harris — kiu angligis la agadraporton de UEA pri la jaro 1997 —, la Centra Oficejo pretigis por la ĵurio ampleksan dokumentaron pri la 90-jara agado de UEA.

Kadre de Kampanjo 2000, ekis ankaŭ preparoj por ree kandidatigi UEA por la pacpremio de Nobel. Ekde la 50-aj jaroj UEA kandidatis jam multfoje. UEA plej proksimis al la premio en 1988, post tiucela kampanjo en la Jubilea Jaro 1987. Laŭ gazetaraj informoj UEA estis tiam unu el la kvin kandidatoj el kiuj la fina premiito estis elektita.



Reagoj



Ĉu la sama Lemaire?

Bildklarigo emfazas la tre liberalan kaj eble antaŭtempan opinion de la belga Esperanto-pioniro Charles Lemaire pri la rajtoj de “negroj” (dec. ‘98, p. 212). En sia libro *King Leopold’s Ghost* (“La fantomo de reĝo Leopoldo”), historio pri la konduto de la belga reĝa registaro en Afriko, Adam Hochschild duloke citas el oficiala raporto kaj taglibro de iu Charles Lemaire, grava reprezentanto de tiu registaro en Kongo. Tiu Lemaire ŝajnas malpli liberala — en la raporto li rekomendas fizike puni ne sufiĉe rapidajn kolektintojn de kaŭĉuko; la taglibra ĉerpaĵo mencias ĉefe kadavronombrojn post vizitoj de li kaj armea taĉmento al vilaĝoj ne sufiĉe entuziasmaj “kunlabori” kun la komercaj ambicioj de la reĝa registaro. Mi esperas ke temas pri tute alia Charles Lemaire, sen ligo kun nia hazarda samnomulo.

Don Harlow — Usono

Red.: Ja temas pri la sama Lemaire. Dank’ al Ionel Oneț, ni disponas la citaĵojn el la libro. Jen, el la raporto: Kiam temis pri kaŭĉuko, mi skribis al la registaro:

“Por kolekti kaŭĉukon en la distrikto, [...] necesas forhaki manojn, nazojn kaj orelojn.” Kaj el la taglibro: 4 aprilo 1891: Halto en Bolebo.

... Ĉar ili venis renkonte al ni kun lancoj kaj pafiloj, la vilaĝo estis bruligita. Unu lokano mortigita. ... 12 aprilo 1891: Atako al la Ikengo-vilaĝoj. ... La granda ĉefo Ekele de Eĉimanĝindu mortigita kaj ĵetita en la akvon. [...] 14 junio 1891: Je la kvina matene mi sendis la zanzibaranon Meĉudi kun ĉ. 40 homoj. ... por bruligi



Charles Lemaire

Nkole. ... Sukcesa operaco, ĉio bruligita. [...] 13 julio 1892: La Bompopo-vilaĝoj atakitaj la 7-an de julio de leŭtenanto Sarrazijn; 20 lokanoj mortigitaj; 13 virinoj kaj infanoj kaptitaj.

Ĉi tiujn spertojn Lemaire aludis jene en sia libro Tra Mez-Afriko (ni lasas la originan tekston sen-korekta):

...penetri kaj okupi perforte Mez-Afrikon estis eraro, humane kaj ekonomie. Ĉar mi longatempе interrilitis je preskaŭ ĉiuj popoloj de Mez-Afriko, mi sciigis ke uzado d’ armiloj estas neutila naŭfoje el dek, ne nur neutila, sed ankaŭ malutila, sekve kriminala.

Tiun krimon la koloniistoj

ĉiunaciaj faras, verŝajne, nekonscie.

Nur tio senkulpigas ilin. Sed oni estos devigata uzi aliajn rimedojn ĉar homoj, pli kaj pli multaj, komencas certigi ke negroj estas homoj posedantaj plene la proprecojn de la homaro, sekve ĝiajn rajtojn, ĝiajn deojn.

Jes, pli kaj pli multaj kalkuliĝas homoj sukcese utiligintaj la nigrulon sen minaci lin pafle.

Pri kio rilatas al mi, mi, unuafoje, vivadis en Afriko, konformante min al tiu enradikita kredaĵo ke estas eble ion ricevi de l’ negroj nur perforte; hodiaŭ, plezure kaj fiere, mi povas diri ke, ekvidinte sufiĉe frue mian eraron, mi sukcesis plenumi miajn du longajn traŭmadojn d’Afriko sen bruligi eĉ unu milit-kartoĉon.

Tio estas gravega eksperimento [sperto]; ĝi firmigis por ĉiam mian konvinkon, laŭ kiu oni devas agi kun la nigrulo ne kiel oni agas kun besto sed kun homo.

El la poŝtkesto

Krizo pro vizo

Mia amiko Gjergji Gushe el Pogradec, Albanio (60-jara delegito), rakontis:

“Mi kaj mia filino estis invititaj al la tradicia ekumena konferenco lastan someron en Nantes, Francio. Ni prezentis nin kun ĉiuj necesaj dokumentoj ĉe la franca konsulejo en Tirano. Atendis nin la konsulo. ‘Ĉu vi parolas la francan?’ li demandis. Mi neis kaj daŭrigis itale. Dio mia, tio

ege kolerigis la konsulon, kiu tuj admonis min ne plu paroli itale. Bone, nin helpis komuniki interpretistino, ĉiam per telefono. ‘Viaj dokumentoj estas regulaj’ diris la konsulo, ‘sed, bedaŭrinde, tre malfacilas akiri francan vizon, ĉar e-istoj ne bone kondukis en Francio kaj iuj el ili ne plu revenis en sian landon.’ Post du tagoj li diris ke nia vizpeto ne estis aprobita. Ĉagrenitaj ni revenis hejmen kaj petis telefone niajn samideanojn en Francio interveni ĉe sia konsulejo. Ni ankaŭ skribis al la ambasadoro

(scipovanta la albanan) kaj al la kultura ataŝeo. Post semajno ni nin prezentis denove ĉe la konsulejo, kie alia viro tre kore akceptis nin kaj post du tagoj donis la vizojn. Ni partoprenis la konferencon kaj revenis al Albanio. Ironie: kun surprizo ni trovis negativan respondon de la kultura ataŝeo, kun jena motivo: bedaŭrinde ni ne povas doni vizojn al vi, ne pro via kulpo, sed pro tiuj kiuj ne bone kondukis, precipe homoj el Rusio, Ĉinio, Pakistano, Bulgario kaj Albanio.”

Bardhyl Selimi Mezini - Albanio

Intencoj pli gravas ol nomo

Certe A. Mossah (feb., p. 31) prave konsterniĝas pro “popoloj kaj triboj” super artikolo (jan., p. 2) pri nova kampanjo, kies nomo prefere devus rilati al “interkulturo”.

Pli gravas tamen ke UEA serioze intencas okupiĝi pri mondregionoj kie Esperanto tute ne ludas rolon, i.a. la arabaj kaj multaj islamaj landoj (kiuj ne kongruas). Nia movado ne akceptu la ripete negativan bildon kiun prezentas pri ili la okcidentaj amasinformiloj, nutritaj de manpleno da agentejoj.

Estas ja du kampoj: la islama, kun tiom da facetoj

kiom havas ekz. kristanismo, kaj la arab(lingv)a landaro, t.e. ĉiuj kun la araba kiel oficiala lingvo. Kompreneble, en tiuj landoj ekzistas diversaj lingvoj kaj diversaj religioj. Ekscii pli pri tio pere de lokaj E-parolantoj dezirindas. Arabio iam science kaj kulture vekis la eŭropanojn kaj agis kiel peranto inter kontinentoj. Ankaŭ nuntempe ni bezonas Arabion kiel liganton inter Afriko, Azio kaj la okcidenta mondo. Mi deziras al la kampanjo plenan sukceson.

Trude Sinno - Nederlando

La religio de Kalaŝnikov

Ĉiusecaj homoj eltrovas ĉiusecajn pretekstojn kontraŭ Esperanto. La konsidero de iuj islamanoj ke Zamenhof estis judo, kaj ke do Esperanto ne estas lerninda, estas tia preteksto. Neniu ja diras ke oni devas esti okul-kuracisto por povi uzi Esperanton, ĉar Zamenhof estis okul-kuracisto! Kaj — kiel diris LoLoZam* — religiaj fanatikuloj tute ne rifuzas uzi Kalaŝnikov-pafilojn, kvankam s-ro Kalaŝnikov ne apartenis al ilia religio. . .

* "Faru demandon al LoLoZam" estas rubriko en Interreto.

Wouter F. Pilger — Nederlando

Facileco ja mezurebla

Kiel "serioza lingvisto", F. Gobbo malakceptas jam la ideon de (eĉ nur relativa) mezurebleco de la lern-facileco de lingvoj (jan., p 12). Li ekperdiĝas en konfuza-ĵon, kiam li emfazas: "Nepre la esperanta estas pli rapide lernebla ol lingvoj ne planitaj, sed [...] ne eblas difini *kiom* pli." Se entute ĉi tiu frazo havas sencon, ĝi asertas ke la lernfacileco estas konstatebla ja sur la nivelo de rango-skalo, kvankam ne ankaŭ sur la nivelo de diferenc-skalo. Laŭ Gobbo "la esperanta" estas pli rapide lernebla ol neplanitaj lingvoj — li do akceptas kiel kriterion de pli granda lernfacileco pli grandan lernrapidecon. Kriterio de ĉi lasta povas esti (a) malpli da lernotempo necesa por lerni la saman instruaĵon, aŭ (b) pli da instruaĵeroj lernitaj en la sama tempo, aŭ (c) pli da lernantoj lernintaj en la sama tempo la saman instruaĵon. La lernotempo estas per horloĝo *mezurebla*, kaj instruaĵeroj, same kiel sukcesintaj lernantoj, estas eĉ *nombrebaj!* Ĉiuj tri kriterioj ebligas do *mezuri* la diferencojn.

Prof. d-ro Helmar Frank - Germanio

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Roterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj* n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.




Politikaj elitoj ade fiaskas

Svarmo de ekonomirilataj vortoj regule aperas, se temas pri tutmondiĝo. Ankaŭ en la pens-instiga artikolo de V. Benczik (feb., p. 22), kiu pintiĝis per la nocio "kultura komerco".

Ĝis nun la politikaj elitoj ne-niom kapablis krei internaciecon aŭ tutmondiĝon trans la karakterizaj rekoniloj de mer-

kreskas: ĝis nun la pozitivo en tutmondiĝo absolute malsuperas la negativon, malgraŭ Interreto kaj pli da senperaj kontaktoj individuaj.

La politikaj elitoj ĉie en la mondo, almenaŭ la nunaj, estas strukture senpovaj. La mekanismoj krei kaj funkciigi tutmondiĝon estas imanente soci- kaj biosfero-difektantaj.



kato, kapitalo, komerco. Eĉ pli: oni nun emas identigi tutmondiĝon kun la ĉefe ekonomia aspekto de nia "unu mondo".

La organizaĵoj kaj entreprenoj kiuj regas la mondan merkaton iĝis grandparte sendependaj de politika kontrolo. Libereco, demokratio, eĉ homrajtoj kaj paco degeneris al ebligiloj de ĉefe ekonomiaj interesgrupoj por pli-malpli forte realigi siajn intencojn.

Kriterioj objektivaj, sciencaj, kiuj nepre rilatigas la tutmondiĝon al konservado de la homa diverseco kaj de integra biosfero, mankas en tiu profitorientita mondkoncepto. Tutmondiĝo pli facile egalas uzurpadon de tio kio restas el la planedo, per metodoj etike ŝtonepokaj, ol kultivon ekvilibrantan, kiu ne forprenas preter la natura regenereblo. Ĝis nun, nete, tutmondiĝo pli profitigas kelkajn ol helpas ĉiujn. Plej inside: tiu ĉi homaro kun tiuj ĉi elitoj forkonsumas la reston de la Tero kaj ties mondo per metodoj pacaj, demokratiaj kaj homrajtaj.


Jam nun la monda merkato pli ol dekoble pli grandas ol necese por ĝustigi misdistribuojn. Kaj ĝenerale: venenado, elĉerpado, detruo de la medio kaj la riĉfontoj, samkiel senlaboreco kaj la breĉo inter riĉo kaj malriĉo, pliige-

Ĝuste inverse en Esperanto. Ĝi apartenas al la tre malmultaj imanente preventivaj eltrovaĵoj homaraj (de la pensa materio, la noosfero). Tia ĝi estas unue laŭkvalite, ĉar ĝi konstruas interesitan, internacian kaj interkulturan informadon-interkompreniĝadon kadre de tutmondiĝo sur minimumo da egoismoj sen perdo de memidentoj, tiel imanente plenumante la postulon de konkreta (kaj aktiva) neŭtraleco, paco kaj respekto al homrajtoj, aparte tiu pri neŭtrala lingvo; kaj due laŭkvante, ĉar ĝi reduktas perlingvan informadon-interkompreniĝadon je ĝia esenca minimumo sen perdo de (lingva) kompetento, tiel imanente plenumante la postulon de konkreta (kaj aktiva) materiala ŝparemo (minimumigo de entropio).

Ĝuste tiu ĉi objektiva argumentado povas defendi la kulturalan fenomenon Esperanto kontraŭ la politika fenomeno kultura komerco. Aŭ ĉu eble eĉ Esperanto sukcesos nur se ĝi montriĝos en ĉi lasta taŭga, t.e. profitdona?

Wolfgang Gunther - Germanio

WOLFGANG GUNTHER (1941), anesteziisto, aktivas ekologie kaj poŝtarte (vd. jan., p. 19).



Recenzoj

Ekonomiko

Konsiloj de labormaniulo

Vastas la mondo, multas laboro (1989). Kim Woo-Choong (1936). Trad. Choe Taesok. Seulo: Shin Cheon Ji, 1998. 219p. 22cm. € 8,15.

Libroj pri ekonomia aŭ komerca temo ne abundas en Esperanto. Tial mi ĝojas pri la traduko de libro de KIM Woo-Choong, fondinto kaj prezidanto de la grandfirmo Daewoo.

Sed la enhavo iom konfuzas min. La aŭtoro klare montras siajn filozofion, vivstilon kaj laborstilon. Tiu triunuo kreskigas kaj sukcesigas lian firmon. Sed semo povas kreski nur en fekunda tero, kaj bona sterko plifortigas la kreskon. En la postmilita situacio de Koreio la manko de ĉio estis tiom granda ke ĉiu industria kaj komerca iniciato estis bonvenigata, kaj registara kreado de favoraj kondiĉoj por industriaj iniciatoj multe faciligis entreprenadon. Do ni ne pensu ke la sukceso de Daewoo estas kaŭzita nur de la talento de ĝia fondinto. Li multege dankas al la eksteraj favoregaj kondiĉoj. Sed li bonege utilis ilin: tio estis liaj talento kaj merito.

Tamen ni devas ne forgesi ke la libro estas fakte preskaŭ dek jarojn malnova. Tiam la korea ekonomio atingis sian pinton. Nun la situacio draste ŝanĝiĝis. La registaro ne plu kovras per protekta mano la grandfirmojn. Sed KIM Woo-Choong estras super Daewoo plu en sia konata ma-

niero entuziasma, fanatika sed ankaŭ agresema kaj manipula.

Por bone kompreni la libron, necesas iom scii pri ĝiaj fono kaj medio. Krome, la



Francjo Vauthier

produktisto de la aŭtoj Cielo kaj Espero meritas iom da ekstra atento en Esperantujo, ĉu ne? Estas verŝajne pli da Cielo-j kaj Espero-j en la mondo ol esperantistoj.

Ĉu home la filozofio kaj vivsinteno de la aŭtoro estas sekvindaj, oni povas dubi. Ekz. en ĉapitro 3 li priskribas la akiron de velkanta belga rafinejo, por ekzempligi kiel li sukcesigas perdiĝintajn entreprenojn. Bedaŭrinde la rakonto estas same malĝusta kiel la konstato ke "Noterdamo" (tiele)

situas en Antverpeno. Kim aĉetis la malprofitdonan Antverpenan rafinejon Universal en 1986 sole por malmultkoste rafini oleon kiun Daewoo ricevis kiel naturajan pagon por konstruprojekto en Libio. Post la rafinado de la porpaga oleo Universal estis tuj revendita. Tiel la memfidaj konstatoj de Kim pri kreita nova etoso por sindona laboro de la

belga Daewoo-personaro ricevas alian prilumon.

Lastatempe mi vojaĝis Rumanion kiel ano de ekonomia esplorkomisiono. Mi malkovris ke Daewoo, por aĉeti la aŭtofabrikon de Dacia-Peugeot, kie Cielo estas nun produktata, postulis senimpostan importon de 10 000 Cielo-j el Koreio. La profito de la venditaj Cielo-j estis uzata por pagi la aĉeton de la rumana aŭtofabriko. Do, la rumanoj mem pagis por tiu korea investo. Daewoo decidis sendi rumanojn al Suda Koreio por trejnado, sed fakte uzis ilin kiel malaltkostajn laboristojn en korea fabriko. Okazis strikoj kaj disputoj pro malharmonio inter koreoj kaj rumanoj. Tion mi ne legis en *Vastas la mondo*. . . Sciante iom da fonaj informoj, mi legas ĉapitron 25 ("Talentoj en-spezi kaj elspezi") iom alie.

En ĉapitro 11 ("Scenejo moviĝas orienten") Kim prognozas ke baldaŭ Koreio ĉefrolas en la internacia scenejo (p. 79). La aŭtoro kredas ke ni ĉiuj iam lernos la korean lingvon (p. 81).

Prave la aŭtoro avertas ke mankas ankoraŭ bona finfaro de koreaj produktoj (p. 40). Prave li alvokas iĝi fakulo (p. 47). Pravus li ke kreemo estas la kremo de entreprenado. Efektive, multas laboro farenda en lia propra lando, kie kopiado kaj licenca produktado floras, sed inventoj mankas. La atingiĝoj de Koreio estas mirindaj, sed ke ĝi fariĝus monda centro...?

Mi povus daŭre citi ekzemplojn de kontraŭdiro, de alternaj saĝaĵoj kaj malsaĝaĵoj, sed mi limiĝu al la konstato ke diversaj temoj estas tro simpligitaj aŭ tro ĝeneraligitaj de la aŭtoro. Oftas pretendoj pri kiuj li ne mencias pruvon. Troas esprimoj kiel konscio, moralo, spirita riĉeco, homkono, fleksebleco, kaj mi-mi-mi.

Konklude: la libro prezentas la internajn kondiĉojn sub kiuj entreprenado povas esti sukcesa, sed tute ne mencias la eksterajn faktorojn. Ĝi estas persona atesto de la prave fiera prezidanto de la tria plej granda korea firma. Estas bedaŭrinde ke tiom miksiĝas bonaj konstatoj kaj konsiloj kun fabeloj, manipulaĵoj, simpligoj, entreprenblindeco kaj ĝeneraligoj. Sed li mem avertas nin: "mi estas labormaniulo".

Kees Ruig - Nederlando



En 1998 224 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1998 estis bela SZ-kalkulilo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



La malfruo de flugo 267

Durankulak. Sabira Ståhlberg (1969). Varna: Bambu, 1998. 78p. 20cm. € 8,70.


La libron mi vidis sur la redaktora skribotablo. Eta libro blua. Verko de iu Sabira Ståhlberg, ĝis nun konata al mi ĉefe kiel talenta redaktori-no de *Kontakto* kaj movada aktivulo. Kio povus esti? “Ĉu mi rajtas recenzi ĝin?” mi demandis. “Jes,” respondis la redaktoro. La posta tago estis la tago de la Granda Vojaĝo, kiam mi forlasis Roterdamon por traflugi kiel blanka birdo la ĉielon — al Londono, Nov-jorko, Hartfordo. La libreto dormis, glimis eĉ, en mia teko.

En la trajno al Amsterdamo mi malfermis ĝin. Durankulak — mistera urbeto inter stepo kaj marĉo. Mi ensorĉiĝis. Mi ensorĉiĝis tiel ke la insistaj snuoj de la pala, malvarmumiginta junulino, kiu sidis en la trajno tuj apud mi (tro tuj), fariĝis magiaj muĝoj, la zumo de la trajno estis sovaĝa muziko, kaj la urĝaj sonoraj de la

portebaj telefonoj ŝajnis nur la harmonia bojado de Durankulakaj hundoj.

En la flughaveno Schiphol, mistera vento blovis trans la polderoj, skuante la teron kiel viŝtukon kaj la aviadilojn kiel vintrajn foliojn. Oni devis fermi la alteriĝejojn. Mi eĉ ne rimarkis la anoncon pri malfruo de flugo 267, tiel intense mi legis. Dum mi sidis tie sur la oranĝaj benkoj de British Airways, mi rimarkis, kvazaŭ tio estus tute normala, etan

verdan virineton sur la atendeja tapiŝo. “Mi estas la muzo de Sabira,” ŝi diris, kaj tuj komencis turniĝi en belstila, arte senarta danco. “Jes,” mi respondis; “mi admiras tiun belan stilon. Temas pri vera literatura talento. Sed kiel tiuj diversaj rakontetoj kunligiĝos? Al kio kondukas ĉio ĉi?”



Ei Durankulak

La tutan libron mi estis leginta tie en la atendejo, kontenta pri la stilo, sed sopira je pli da formo, pli da direkto — kiam venis lasta anonco: “Flugo 267 pretas por akcepti pasaĝerojn. La Granda Vento pasis. Cetere, legu la libron de Sabira Ståhlberg.” Mi trenis miajn sakojn al la aviadilo kvazaŭ en sonĝo. Pretere mi rimarkis ke la starovico antaŭ la deĵor-podio sin transformis en cirklon, kaj nun, lante sed ĉiam pli rapide, la pasaĝeroj komencis danci misteran, harmonian dancon. Ĉu Brigaduno venis al Schiphol? Ĉu tiu verda virineto nomiĝas Zelda? Aŭ ĉu nur temas pri nigrablankaj memoroj pri Melina Mercouri en krepuska greka vilaĝo? Poste, sekure ligita al mia aviadila sidloko, kiu transportis min fulmrapide al Hitro, la Londona flughaveno, mi tamen pli serioze meditis. Eble, Zelda kaj Sabira, vi pledas, en nia senradika mondo, por iu izolo, iu sento ke unu loko ne estas alia loko, ke pli gravas esti ano de komunumo ol ano de postmoderna tutmonda civito. Ho Schiphol, ho artefariteco! La polderoj dolĉe verdas sub la grizaj aviadilaj flugiloj.

Humphrey Tonkin - Usono

Por daŭra konatiĝo

Falantaj muroj kaj aliaj rakontoj. Trevor Steele (1940). Vieno: IEM, 1997. 160p. 23cm. € 11,10.

Lam mi vizitis Litovion ofte, sed post la sendependiĝo de mia lando (Estonio) kaj Litovio, neniam — ĝis antaŭ unu semajno, pro vojaĝo de mia koruso. Dum tiu vizito mi sukcesis kontaktiĝi kun tri esperantistoj: litovo, litovino kaj aŭstraliano. La nomo de ĉi tiu lasta estis jam konata al mi: Trevor Steele.

Ekkoninte s-ron Steele, mi volis daŭre konatiĝi kun tiu interesa persono. Eĉ post hejmenveturo. Tiam mi enmanigis liajn vojaĝrakontojn, kvankam mi devas konfesi ke mi ne tre amas ĉi tiun ĝenron. Mi preferas fantastikon, ekz. verkojn de Nemere kaj Tolkien.

Sed nun ŝajnas al mi ke estis eraro en mia pensmaniero, ĉar la reala mondo estas same interesa kiel la fantasta.

Ne nur tiu parto de *Falantaj muroj* interesis min kiu rakontas pri iama Sovetunio, kie mi naskiĝis kaj kreskis, aŭ pri Estonio. Ĉio estis interesa. Kiel eks-sovetiano, mi bone komprenis la temaron de la plejparto de la libro, sed ankaŭ ŝatis legi pri aliaj mondopartoj. Post la legado ŝajnis al mi ke mi mem vizitis tiujn lokojn. Nur la lasta rakonto, kiu parolas pri lia propra lando, ŝajnis iom nenatura, kvazaŭ mankas al li impresoj, sed li nepre volus ion trovi pri kio skribi. Sed mi certas ke li ne malhavas pli interesajn vojaĝimpresojn. Steele ja daŭre vojaĝas kaj instruas!

La libro estis facile legebla — oni tuj sentas ke la aŭtoro pensas rekte en Esperanto. La lingvaĵo estas pli natura ol en tradukoj. Tial plaĉas al mi la originalaj libroj en Esperanto. Kaj nia lingvo ja vivas plejparte dum vojaĝoj kaj dum aranĝoj. Sekve estas aparte bone legi pri kontaktoj kun esperantistoj.

Kalle Vilbaste - Estonio

NOVA TELEVID-SERIA KURSO



VERKITA DE
PAUL GUBBINS

POR INSTRUI
ESPERANTON

KUN JUNAJ TALENTAJ
ESPERANTISTOJ EN LA ROLOJ

Esperanto – pasporto al la tuta mondo konsistas el 15 lecionoj (po 30 minutoj) kaj akompana presita materialo, celantaj individuan aŭ grupan studadon. La distra historio, konstruita sur didaktika bazo, faciligas kaj ĝojigas la lernadon. Ĉiu leciono okazas plene en Esperanto kaj enhavas tri partojn: enkondukon, intrigon kaj resumon.

La kontinueco de la aventuroj de familio Bonvolo, la televidseria karaktero, kaj la vigla kaj sprita dialogo tenas la atenton de lernantoj — kaj eĉ de pli spertaj parolantoj de nia lingvo!

La resumo detale traktas la ĉefajn gramatikajn erojn prezentitajn en ĉiu ĉapitro. Skribekzercoj, verkitaj de Stefan McGill, kompletigas la lecionojn.

La unuaj kvar lecionoj jam aperis kaj estas vaste laŭdataj. Prezo: C 78,95. La sekvaj ses lecionoj estis filmitaj somere de 1998. Antaŭmenda prezo: C 100. Antaŭmenda prezo por la tuta kompleto de 15 lecionoj: C 240.

Ĝuu kaj ĝuigu Esperanton kun la familio Bonvolo!

Kial dioj teksas malfeliĉon?

Tri rakontoj pri la Miljara Paco. John Francis (1924). Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1997. 117p. 21cm. € 12,00.


La tri noveloj en ĉi tiu volumo invitas la leganton en mondon paralelan, laŭ literatura tradicio kiun la brita kulturo admirinde disvolvis ekde Swift (prave citita en la kovrilnoto) ĝis Tolkien. Kaj, konforme al la reguloj de tiu renverso, la aŭtoro en la tria novelo enkondukas vizitanton el nia mondo, kiu en iu aprilo ("nomo de la kvara dekdono de ilia jaro", laŭ la alimonda tradukinto de ties raporto) transsaltas al la fikcia realo kaj "vole-nevole" partoprenas en la intrigoj de la fantazia kortego de Juglando.

La noveloj estas tre zorgite tekstaj, kaj multaj personoj, multaj rakontaj fadenoj lerte interplektiĝas en reto de surprizaj rilatoj, kiuj ja postulas la atenton de la leganto kaj samtempe pravas la fantazian riĉon de la verkisto. La utopia forto de la Francis-a prozo ekspluatas la konvencian fonon de fabela kortego por analizi la hipotezon ke leĝe difinita mortopuno al ŝtatestroj kiuj ial ajn iniciatas militon, povus garantii plurjar-

centan pacon. Koncepto ja simpla kaj rakonte efika, kiu implicas la ideon ke militojn kaŭzas ne procezoj ekonomiaj kaj sociaj senfine komplikaj, sed la nura inklinado de unuopaj ŝtatestroj. Certe la aŭtoro

mem suspektemas ĉe tiel naŭva klarigo, ĉar anstataŭ priskribi la avantaĝojn de tiu ora situacio li daŭre novelas pri la *dangeroj* kiujn tiu nestabila, leĝe kaj devige kreita pacoformo devas alfronti. Interese ke unu el tiuj danĝeroj kuŝas laŭ Francis en la nesubpremebla inklinado al "emocioj", opozicie al racia kontrolo; kiu ajn emocio, ne nur agresemo, sed ankaŭ komerca avido: "plej potenca kaj neŝancelbla emocio" (p. 56), laŭ la preskaŭ-konsenta

priskribo de militema persono. Kaj ne nur socie malaprobataj emocioj povas inklinigi al milito, sed ankaŭ poezio: "ĝuste ĉar ili estas poetoj ili bezonas la koloron, dramon kaj suferon de milito, [...] fortaj emocioj kaj konstanta luktado necesas al la poezio" (p. 58-59). Kaj tio kurioze proksimas al la



Homera opinio ke "dioj teksas malfeliĉon, por ke al posteuloj ne manku kantotemoj".

Substrekinde estas ankaŭ ke, malkiel en Swift, la "strangulon" el nia mondo tute ne kovras la aŭtoro aprobo: li estas subtenanto de la heroaj virtoj kaj de milita agresemo, kaj ne povas kompreni ke la imperiestro de Juglando juĝas impetan batalon nura hombuĉado. Lia sento de supereco rilate al juglandanoj pruviĝas kiel aŭtoro blago kiam li, okaze de imperiestra malsano, pretendas kuraci lin per kupo, hirudo kaj kaŭterizo, kaj malestime citas la "superstiĉajn vantaĵojn" de la juglandanoj (kiuj male per pli mildaj rimedoj redonos la sanon al la ŝajne frenezeta, siamaniere tamen saĝa imperiestro).

Francis modulas sian esperanton precize kaj per rigora fundamenteco. Mi plukis tie kaj tie kelkajn preserarojn, kiujn mi listigas ĉi tie por eventuala dua eldono: p. 13, 14: Fereca > Fereco; 17: humilgi > humiligi; 39: temo > tempo; 44: ludekzerojn > lud-ekzercojn; 48: mistarfo > mistrafo; 60: plaĉas la > plaĉas al; 61: faso! > farsolo!; 62: provante > provanta; 78: Nevepato > Mevepato; 82-83: mankas citiloj antaŭ "sed estas..." kaj post "efektivaj vortoj"; 84: respektit > respekti; 88: malestinon > malestimon; 103: antaŭeneklinis > antaŭenklinitis; 109: min ekdiris > mi ekdiris.

Entute la volumo estas tamen tre plaĉa laŭaspekto, kaj inde envidiĝas en la historie gloran tradicion de Stafeto.

Mauro Nervi - *Italia*

Maskerado ĉirkaŭ kulturo

Karnavale. Maskita rakonto. Abel Montagut (1953). Vieno: IEM, 1997. 65p. 23cm. € 9,00.

Ni ĉiuj rolas klaŭne ĉe uzado de lingvo. Vole-nevole, deve-devigate ni lernas la gepatran, la anglan, Esperanton... "ni travivas senfinan kulturen maskeradon, unuavice truditajn sed poste senkonteste akceptitajn".

La lingva kaj kultura problemoj starigas la alternativon de tradicio kaj racio. Konservativaj tradicioj ofte postrestigas naciojn kaj damaĝas popolanajn korpon kaj spiriton, ĉar tradicioj ofte evoluis el malscienco. Ni heredu bonajn tradiciojn de niaj pragepatroj, sed forlasu tiujn kiuj pruviĝas jam malbonaj. Koncerne lingvon, iam ŝajne mankas kriterio, kaj ekfunkcias nur la racio de profito.

La titolo *Karnavale* unuavide pensigas pri la tempo "dediĉata al amuzaĵoj, kiu

iras de la festo de l' Tri Reĝoj ĝis la Cindromerkredo" (PIV). Kaj je eklego laŭvica, ekde la unua paĝo, la enhavo ja ŝajnas poezi-forma priskribo de veraj karnavalscenoj okazintaj en Katalunio antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj. Plastikaj bildoj montras la vervan etoson de tia festo. Sed kiam vi tralegis la pli grandan libroparton, la poezion, vi ekkonscios ke ĉi tiu temas ĉefe pri "volonta forlaso de la propra lingvo", kaj la sekva parto proza pri "nekomprenejo de la alikultureco kaj alilingveco de popolo fare de najbaroj, ĉi-okaze prezentita per la arhetipo Don Kihoto". Kun ponto-funkciaj postnotoj, glosoj kaj intervortoj malbone niĝas ĉi tiu libreto pri la kompleksa de kulturo, precipe pri lingvo.

Lingvo: ĉiam problemoj delikata, dilema!

Montagut, admirata, kuraĝas tuŝi la problemon, sed kiel aliaj li ne elmetas solvan programon; li nur liveras pri la temo "lingva identeco" du kontraŭajn vidpunktojn — internan kaj eksteran. Lia propra sinteno montriĝas dilema. Unuflanke, li sentas ŝokon ĉe onia indiferento al reuzebleco de la kataluna lingvo: jen naci-ama konservemo. Duaflanke, "intervorte" li agnoskas sin "praktika internaciisto, lingve kaj vojaĝe". Sendube, nia samideano Montagut tute ne estas ŝovinismo.

Rilate herediton kaj evoluigon Montagut staras en la mezo. Enhave *Karnavale* estas kunigo de historio kaj adapto. Lingve la libreto ŝajnas neŭtrala — nek avangarda nek malavangarda; ĝia lingvaĵo estas fundamente bona.

Fine, mi devas mencii la preskvaliton. Ĉiam bona estas preskaŭ ĉio de IEM. Ĉi-okaze mi eltrovis nur unu misvorton: *car* en p. 17 eble estas mispresado de *ĉar*.

Mao Zifu - *Ĉinio*

Laste aperis



Epitomo de la Alianco Universala. Kalamata: La Alianco Universala, 1998. 34p. 21cm. Prezentado de tutmonda federacia movado baziĝanta "sur laika spiritualismo", kiu laboras "por konkretigi la Unuecon Homan". € 4,45.

Espéranto avec plaisir, L'. *Cours d'espéranto pour tous.* Christian Bertin (1949). La aŭtoro, 1999 (neindikita). 108+108p. 21cm. Lernolibro por franclingvaj komencantoj. € 17,50.

Esperanto na visão espírita, O. Ismael Gomes Braga (1891-1969). Rio de Janeiro: Sociedad Editora Espírita F.V. Lorenz, 1998. 248p. ISBN 85 86984 03 5. 21cm. En la portugala. Kolekto de artikoloj de spiritista E-pioniro. € 9,00.

Esperanto sen mitoj. *Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado.* Ziko Marcus Sikosek (1973). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 311p. ISBN 90 71205 70 3. 21cm. Detalriĉa manlibro pri la dezirindaj maniero kaj enhavo de informado pri Esperanto. € 24,00.

Faŭsto. *Partoj I kaj II* (1808, 1831). Johann Wolfgang von Goethe (1749-1832). El la germana trad. Karl Schulze (1910-83). Enkondukis kaj redaktis Ulrich Becker. Berlin: Mondial, 1999. 207p. ISBN 3 9805763 4 5. 24cm. Dramo pri homo kulpigita pri pakto kun la diablo; mondfama alegorio pri la homa vivo. € 12,90.



Post pli ol dek kvin jaroj en tirkesto, fine legeblas Esperante unu el la plej famaj verkoj de la "mondliteraturo" – koncepto kreita de Goethe mem.

Kodo de Hamurabo. *Esperanto-traduko kaj komentarioj de unu el la plej antikvaj jurokodoj (1700 jaroj a.K.).* Trad. Tom Arbo Høeg kaj Odd Tangerud. Malaga / Córdoba: Andaluza E-Unuiĝo, 1999. 82p. 21cm. € 6,00.

Liberecanaj pensoj. La Boétie, O. Wilde k.m.a. Beauville: SAT-Broŝurservo – Laŭtel!, 1999. 480p. 21cm. 2 volumoj. Antologio de verkoj anarkiismaj, plejparte jam aperintaj broŝurforme. € 21,90.

Liturgio de l' foiro, La. (*Elementoj por ekzegezo*). Kun suplemento. Jorge Camacho (1966). Kun kontribuoj de R. Corsetti, P. Daŝgupto, J. Lindstedt kaj C. Piron. Antverpeno: Progresema E-Forumo, 1999. 45p. 21cm. Dokumentita, polemika analizo de raŭmismo, kia ĝin interpretas kaj praktikas Kooperativo de Literatura Foiro. € 2,70.

Oraklo / Orakel. Susanne Faschon (1925-95). Ilus. Rita Rössler-Buckel. El la germana kaj ties palatinata dialekto trad. Franz Georg-Rössler. Dudenhofen: Ponto, 1997. 68 (ne num.) p. ISBN 3 9803793 4 5. 21cm. Dulingva. Kremado de poetina vivoverko. € 4,80.

Spirito de Esperanto kaj la "samideanaj" malamikaĵoj. *Diskutkajeroj 2.* Ignat Bociort (1924). Rotterdam: UEA, 1999. 12p. ISBN 1388-2252. 21cm. Eseo premiita en Belartaj Konkursoj, pledanta por deca konduto inter e-istoj. € 1,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Vojoj de la saĝeco. Ubiratan Rosa. El la portugala trad. Osvaldo Pires de Holanda. São Paulo: la aŭtoro, 1998. 276p. 21cm. "Konsiloj al tiuj kiuj penas atingi moralan kaj spiritan evoluon". € 10,50.

VIDBENDOJ

Espere despere. *Tri unuaktaj dramoj pri nia lingvo 110-jara.* Rolas la teatrofako de LF-koop (Veneta Zjumbjuleva, Nikolaj Uzunov k. a.). Reĝisoris Teo Jurukov. Svislando: LF-koop, 1997. 60 min. Sándor Szathmári: *Budapeŝta ekzameno* (1966), Julio Baghy: *Lingva evoluo* (1932), G. Silfer: *La vorta klaso* (1997). € 39,90.

Venu rapide homoj. *Muzika komedio en du aktoj.* Tekstoj de M. kaj P. Castellacci k.a. Muziko de M. Paulicelli k.a. El la itala trad. Giuseppe Castelli kaj Pier Luigi Cinqantini. Blera: La Nuova Compagnia, 1998. PAL. Ĉ. 120 min. Muzikalo pri la vivo de Sankta Francisko, "kun aparta atento al la plej junecaj kaj gajaj aspektoj". € 24,00.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

KONTAKTO en nordia revuo

Astra Nova, soci-kultura revuo en Finnlando kaj Svedio, aperigis (1998/6) taglibraĵon de d-rino Sabira Ståhlberg. Ŝi priskribas sian redaktoran laboron por Kontakto kaj por Lando malekzista, antologio de la finland-sveda poetino Edith Södergran (1892-1923), kiu aperos ĉi-jare, kun subteno de Asocio por la Finnlanda Literaturo. (S. Ståhlberg)

ĈESIS aperi

La revuoj Voĉo el Turingujo, la aŭstra La Socialisto kaj Esperantisto Slovaka: ĉi ties redaktoro, Stano Marček, klarigis ke lia revuo bezonus almenaŭ 800 abonantojn por travi, sed en du jaroj sukcesis varbi nur tricenton.

TEJO TUTMONDE: Nova adreso

Redaktoro: Rick Newsum, 8 Mead Way, Sea Mills, Bristol, Britio BS9 2EZ; ☎/Δ+44/117/968-46-83; ✉tejo-tutmonde@esperanto.org.



Foliume

JUNA AMIKO antologias

La porinfana, jarkvarona Juna Amiko, 25-jara en 1998, startis ĉi-jare kun antologia duobla numero, kunmetita de ĉiuj iamaj redaktoroj: Oldřich Kníchal, Géza Kurucz kaj Stefan MacGill. Krom materialoj el la fruaj jaroj, aperas du paĝoj dediĉitaj al Kampanjo 2000, ĉar "tiu ĉi numero [...] atingos pli da esperantistoj ol ordinaraĵoj". Juna Amiko regule plu havos plenkolorajn kovrilojn kaj aldonajn paĝojn. Abonu aŭ petu specimenon: pk. 193, HU-1368 Budapest, Hungario; ✉junaamiko@esperanto.nu.

Arta konkurso kaj spektaklo samtempe, ĝis lastatempe floris en Litovio la tradicia E-aranĝo Muzo, okazinta jam 29 fojojn. Tamen, post la forpaso de ĝia konstanta organizanto Adomas Vaitilavičius en 1996, ĝi ekvelkis kaj pasintjare eĉ ne okazis, malgraŭ ke ŝajne pluas intereso pri ĝi. Petras Čeliaskas, redaktoro de *Litova Stelo* (P.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio), atendas leterojn “pri plua sorto de Muzoj”.

La loka sveda gazeto *Hemmets Journal* raportis sur tuta paĝo pri la pasioj de la 56-jara flegistino Ingrid Näsholm: Esperanto kaj katoj. La unuan pasion ŝi kultivas ekde la aĝo de 13 jaroj, la duan de antaŭ 15 jaroj, kiam ŝi malkovris la libron "Parolu kun via kato". Feliĉa posedantino de la du felisoj Whitis (13-jara, surbilde)

La simpatia raporto estis rimarkita de la tutlanda gazeto *Veckojournalen*, kiu realigis propran intervjuon.

Kontakt: Christoph Knabe, Dortmund Str. 9A, DE-10555 Berlin, Germany; <http://www.tfh-knabe/REF.html/>



Vidbendo pri REF
(€ 16,35)

berlin.de~knabe/REF.html/

Historiisto-esploristo Michel Clément Ph.D. proponas al ĉiuj e-istaj historiistoj (amatoraj kaj profesiaj) fondi reton aŭ societon (ekz. Internacian Societon de Historio) i.a. por publikigi esplorrezultojn en elektronika revuo aŭ per alia rimedo. Kontakto: 6348, rue Chambord, Montréal, Québec, H2G 3B7, Kanado; mclement.michel@uqam.ca, <http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html/>.

Du pasagerŝipoj, kiuj veturas de majo 1998 inter Amsterdamo kaj Velsen (Nederlando), estis lastatempe rebaptitaj, je nomoj gajnintaj en publika konkurso. La ŝipoj nun nomiĝas *Archimedes* kaj, laŭ propono de Rick de Wolf, *La Alta Rapido*. (FEN-X)

Joachim Giessner, tiama prezidanto de Internacia Federacio de E-istaj Fervojistoj, jam de la 80-aj jaroj provis atingi ke internacia trajno, eble inter Germanio kaj Pollando, ricevu la nomon Zamenhof aŭ Esperanto. Liaj klopodoj fruktis tamen en Rumanio: kontaktoj kun I. V. Leancu, posta ĝenerala direktoro de la rumanaŝtataj fervojoj, rezultigis ke la trajnparo n-ro 1623/24, funkcia inter Bukareŝto kaj Sibiu, portas nun la nomon Esperanto. (*Internacia Fervojisto*)

TEXT: ASA HOLSTEN
FOTO: LINUS WALLIN

Katter och språket esperanto. Ja, Ingrid Näsholm i Sundsvall har faktiskt lyckats att kombinera sina två största intressen galant. Hon ger ut en tidning som skrivs på esperanto och handlar om katter!

Det låter nästan otroligt, men Kattbladet har blivit så populärt att det nu ges ut i närmare 40 länder. Gensvaret har varit oerhört stort!

Detta är en esperanto-sedon

— Jag har talat esperanto sedan jag var 13 år, berättar Ingrid som idag är 56 år och sjuksköterska. Min mamma kan också språket och som tonåring tog jag en kurs och fastnade för det, jag med. Esperanto är sex gånger lättare att lära sig än engelska, sägs det. Genom esperanto har jag fått kontakt med människor världen över och det var genom en esperantoförening som jag träffade min man.

— För 15 år sedan läste jag boken "Tala med din katt" av Patricia Moyes och bestämde mig för att köpa en katt. Jag har alltid varit intresserad av djur och deras beteenden och har haft både hästar och hundar. Ja, först trodde jag att det var för min dotters skull som vi skulle utöka familjen med en liten kisse. Men snart kom jag på att det faktiskt var jag själv som var ivrigast.

Det var så det kom sig att ch
chillapersern Silverspirits Wh
Thunder, även kallad Wh
hamnade hemma hos famil
Nicolm. Sedan dess har s

— Jag pratar ofta med mina
ter och kan se på deras kropp
språk om de för tillfället inte
så bra. Känner du ett djur v
vet du hur det mår. Katterna
gerar i sin tur på hur vi i fam
känner oss. När min dotter
ledsen som liten flicka gick
tis fram till henne och tröst
som hon kunde.

— Ja, katter har ett väldigt
Befaller du däremot en k
göra något får du ingen
respons. Du kan inte dr
den med tvång. Fast katt

aldrig haft svårt att drömma om att bli en människa! Det räcker med att jag min katt jamar hjärtskärt när jag inte är hemma i mer än några minuter, säger jag.

ig lika
tygar
som ger
på espe-
nar hon om
ga chin-

Forts på slottet. 1911.

Kattälskare är sig lika världen över, intygar Ingrid Näsholm som ger ut en kattidning på esperanto. Här kramar hon om sin egen 13-åriga chin-chilla perser Whitts.



BELGIO: Bahaa instigo

Post prelego — organizita de lokaj bahaanoj — de lingvisto Thierry Sterck pri Esperanto kaj pri la koncepto de universala helplingvo, la 23-an de januaro en Tournai fondiĝis Esperanto-grupo. (M. Delforge, G. Giraud)

BULGARIO: Konkurso

Por gajni Esperantajn librojn kaj diplomojn kaj por aperi en *Literatura Foiro*, sendu originalajn poemojn kaj humuraĵojn (ne jam publikigitajn aŭ aliloke konkursintajn), en 3 ekzempleroj, al E-ista Domo de Kulturo en Razgrad (str. Sv. Kliment EK-3, BG-7200 Razgrad, Bulgario). Subskribu pseŭdonime kaj identigu vin en aparta koverto. La ĵurio kunsidos la 31-an de majo. (L. Trifončovski)

EŬROPO: Kvarlanda konsultiĝo

Po 2 gvidantoj el 4 landoj — de Pola, Hungara kaj Kultura (Hungario) E-Asocioj, Kroata E-Ligo kaj Slovaka E-Federacio — kunvenis en Budapeŝto por konsultiĝo (19-21 marto). (Invititoj el Aŭstrio, Ĉeĥio kaj Slovenio ne sukcesis alveni.) Ili detale traktis pri la stato de la E-movado en siaj landoj, pri la rilatoj al UEA kaj aliaj E-organizoj, la ebloj de kunagado rilate al E-aranĝoj, libroservoj, komuna E-revuo ktp.

En komuna rezolucio, sendota al prezidentoj, ĉefministroj kaj parlamentestroj de la kvar landoj, la konsultiĝanoj alvokis "en internaciaj rilatoj alpaŝi al sinsekva forigado de lingva diskriminacio" kaj proponis "ebliĝi la egalrajtan lingvan komunikadon [aplikante] la neŭtralan lingvon Esperanto".

La ĉeestantoj decidis regule plu kunveni, sekvafoje en Slovakio (17-19 sep.). (L. Szilvási, O. Princz)

GERMANIO: Plia landa ligo

La 29-an de novembro en Frankfurt sur Majno 16 kunvenintoj fondis Hesian E-Ligon (HEL), asocio por la federacia lando Hesujo (Hessen). Nun ĉiu federacia lando de Germanio havas propran ligon, krom la land-statusa

urbo Bremeno. La prezidanto de HEL estas d-ro Ulrich Matthias. (Malbabelo, *Esperanto aktuel*)

HUNGARIO: Instrua rekordo

Rekorda nombro: en februaro 125 gejunuloj enskribiĝis por la baza E-kurso de Tibor Papp ĉe

Universitato KLTE en Debrecen (Hungario). En Nyíregyháza pli ol 30 altlernejoj studas en tri E-kursoj por trapasi ŝtatan ekzamenon pri lingvo (antaŭkondiĉo en Hungario por ricevi diplomon de supera edukado). (T. Papp, Ret-Info)



Komplezo de Ali Mze Mihidjahi

KOMOROJ: Premiero en UEA

"Jen foto de nia ceremonio pri la naskiĝdata festo de s-ro L.L.Z. en mia vilaĝo, Ndzaouze-Mitsamiouli. Bv. anonci tiun foton, por ke la aliaj esperantistoj sciuj ke en Komoroj estas esperantistoj" — skribas al ni Ali Mze Mihidjahi (27-jara), dua de maldekstre sur la foto. Efektive, pro lia membriĝo Komoroj — insularo norde de Madagaskaro — aperas en la membrostadistiko de UEA (p. 66) la unuan fojon.

ITALIO: Semajno de amikeco

• Por celebri la Semajnon de Internacia Amikeco (21-27 feb.), ĉe Triesta E-Asocio la 26-an de feb. estis prezentitaj kantoj en Esperanto el pluraj mondpartoj kaj salutkartoj forsenditaj; la 27-an e-istoj el tri landoj vizitis lokan paperfabrikon kaj reciprokis ties bufedan regalon per la libro *La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado*; la 28-an Anna Löwenstein prelegis angle pri E-o ĉe Adriatika Kolegio de Unu Mondo en Duino.

• En Bolonja aranĝo (21 feb.), du e-istoj kaj loka ano de Amnestio Internacia prezentis la konverĝajn ecojn de la du movadoj. (E. Tantin Ackermann)

TAĜIKIO: Eĥas la silka vojo


En la ombro de granda intereso pri la angla lingvo, en mez- kaj altlernejoj aperas dezirantoj lerni ankaŭ Esperanton. El la ĉ. 700 lernintoj kaj ĉ. 20 E-spertuloj tamen nur Viktor Kiseljov kaj Firdaŭs Ŝukurov loĝas en la ĉefurbo Duŝanbe; ĉi lasta, universitata instruisto, penas informadi kaj gvidas kursojn.

Ŝukurov pasintjare kunfaris 80-minutan Esperantan videofilmon pri Taĝikio, *Malproksima*

eĥo de la silka vojo. Kun la usonano Joseph F. Conroy (aŭtoro de *Beginner's Esperanto*) li kunverkis vortaron-frazaron dudirekte taĝikan-anglan.

Krome, Ŝukurov eldonis en 1000 ekzempleroj taĝikan tradukon de *Elevatora Seulo*, volumo de la korea poetino Kim Yocho, kiun li realigis kun Salim Ĥatloni, konata taĝika poeto. La libreto mencias ke Esperanto rolis pontlingve ĉe la traduko. (K. Tasabi)

UK Ĝis 26 marto al la Berlina UK (31 jul. - 7 aŭg. 1999) aliĝis 2051 personoj el 55 landoj.



AŬSTRALIO: Antaŭ ĵurnalistoj

• Kep Enderby donis februare paroladon pri E-o kaj UEA antaŭ la Asocio de Eksterlandaj Ĵurnalistoj en Sidnejo. La organizinto, John Shaw, invitis lin verki artikolon pri la Berlina UK por la revuo kiun li redaktas, *Europe Business Review*. (K. Enderby)

• La 14-an de feb. raportisto de la nacia radio JJJ, celanta junan aŭskultantaron, intervjuis anojn de la Sidneja E-klubo. Post la tre pozitiva elsendo (17 feb.) alvenis 12 informpetoj. (*Telopeo*)

AŬSTRIO: Skeptike, sed...

La pli ol 100 mil legantoj de la ĵurnalo *Die Presse* povis legi (28 jan.) sesonon de paĝo pri E-o: "Kiel mondlingvo E-o ne sukcesis, sed...", kaj sekvas prezento de pozitivaj faktoj. La bulvarda ĵurnalo *Kurier* titolis sian duonpaĝon (8 feb.) "Perdita iluzio: Mondlingvo sen lobio". Apud skeptika priskribo, aperis gramatiketo, informo pri E-kurso, telefonnumeroj ktp. (W. Klag)

BRITIO: Ursa servo?

La nigra urso Bruno de la bestĝardeno de Colchester estis "adoptita" de La Orienta Esperanto-Federacio. Pri tio sciigas tabulo apud la ursejo. Kvar familioj tiuregionaj, kiuj lernas E-on per la Urso-Kurso, ricevis senpagajn enirbiletojn. (*The Bear Facts!*)

ĈEĤIO: Pli ol 200 mencioj

Laŭ la komisiono por informado de Ĉeĥa E-Asocio, Esperanto estis en la pasinta jaro menciita en la ĉeĥa gazetaro 209 fojojn: temas i.a. pri 75 artikoloj, 22 lingvolecionoj kaj 5 tradukoj el Esperanto.

FRANCIO: Dek paĝoj da *Silence*

La ekologia revuo *Silence* (5, rue Dumege, FR-69004 Lyon, Francio) dediĉis dek paĝojn de sia decembra numero al Esperanto. (*SAT-Amikaro*)

GERMANIO: La saĝo de l' aĝo

La gazeto *Leipziger Volkszeitung* portretis (25 feb.) la 85-jaran Lepsikan esperantistinon Ino Kolbe, korektantinon de la ĵus aperinta *Faŭsto* (vd. p. 75): ŝi lastatempe spertiĝis en kurso pri komputil-uzado kaj jam komencos alian kurson pri portret-desegnado. (*Magdeburga folio*)

HISPANIO: Ĉu eblas amori?

En sia populara televida programo la verkisto Fernando Sánchez Dragó diskutis kun la 80-jara kataluna teologo kaj filozofo Raimon Panikkar. Fine de la elsendo (3 jan.) la du aŭtoroj asertis ke oni "ne povas preĝi aŭ eĉ amori en Esperanto". ➔


NEDERLANDO: TV-postlasaĵo

Multaj interesejoj kontaktis la landan asocion Esperanto Nederland post la televida dokumentaĵo "La postlasaĵo de doktoro Esperanto" (vd. dec. '98, p. 213) kaj la artikoloj ĝin sekvintaj (ekz. en *Leeuwarder Courant* kaj



La aŭtoroj de la filmo: Maarten Schmidt (antaŭe) kaj Thomas Doebele

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

SUDAMERIKANOJ SERĈATAJ.

Mi aliĝis al la Berlina UK. Mi volas renkonti esperantistojn el Argentino, Brazilo kaj Ĉilio. Mia adreso: Per Edler, Box 33, SE-74010 Almunge, Svedio.

PRI SPIRITISMO deziras korespondi s-ro Antonino Cabanelas

Maestro, Calle Maria Auxiliadora n-ro 291 entre Lourdes y Alegría, Reparte Vibora Park, Municipio Arroyo Naranjo, Ciudad Habana 9, CU-10900 Kubo.

NOVA ADRESO DE JORGE CAMACHO

ekde marto 1999: Chantada 43, 1-J, ES-28035 Madrid, Hispanujo, tel. +34-913737495.

GRUPO DA GEKURSOJ

(40-60 j.) deziras korespondi kun esperantistoj tutmonde. Skribu bildkartojn kaj poŝtkartojn por letervespero okazanta la 6-an de majo, al: Pola Esperanto-Asocio, p.k. 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando.

POR EKSPOZICIO

okaze de la 90-jara datreveno de la kluba Esperanto-movado en Gliwice (Gleiwitz), sendu bild- kaj poŝtkartojn Esperantajn al Stanisław Mandrak (ul. Kormoranów 39/16, PL 44-114 Gliwice, Pollando; staman@ka.onet.pl). Ĉiuj sendintoj ricevos rekompence Esperanto-bildkartojn el Gliwice.

EP: Pli ol 20% subtenas; kiom post junio?



Jam pli ol 20% el la 626 anoj de Eŭropa Parlamento (EP) "diversgrade opinias ke Esperanto povus iel helpi por solvi la lingvan problemaron en Eŭropa Unio" (EU) — sciigis Germain Pirlot (Steenbakkerstraat 21, BE-8400 Oostende,

Belgio), kiu konstante zorgas, informade kaj koresponde, pri la larĝigo de tiu rondo. La nombro de subtenantoj estis 131 (20,92%) je la fino de februaro. Plej multnombre favoras la ideon la eŭro-parlamentanoj irlandaj (14 el 15), belgaj (18 el 25) kaj britaj (30 el 87); fakte, la proporcio de la subtenantoj inter ĉiuj alinacianoj kune estas nur 13,8%.

Eŭropa Parlamento renoviĝos per balotado en junio. Pirlot sugestas ke esperantistoj voĉdonu por kandidatoj enlistiĝintaj, kaj ke aktivuloj havigu al si la plej freŝdatan liston por kopie sendi ĝin — propranome aŭ nome de E-grupo — al jamaj listanoj (por gratuli) kaj al tiuj kiuj ne enlistiĝis (por esprimi bedaŭron). Ambaŭkaze substrekindas ke tia listo influas onian preferon ĉe la elektoj.

kvinkolumna intervjuo kun la asocia sekretariino Ineke Emmelkamp en *Nieuwsblad van het Noorden*. La asocio dissendis fine de decembro leteron, al ĉiuj informpetintoj. Pozitive reagis 63 personoj, el kiuj 4 tuj membriĝis kaj unu fariĝis donacanto. Ekneces organizi kursojn por ĉiuj bezonoj dise tra la lando.

(NGGE
sciigas,
FEN-X)

estis esperantisto. (M. Gutiérrez, A. Montagut, P. Orta)

- La tutlanda ĵurnalo *El País* menciis en sia suplemento *Ciberp@ís* (4 jan.) la Esperantan TTT-paĝon de la bildrakonta heroo Tinĉjo, okaze de ĉi ties 75-a naskiĝtago: www.esperanto.net/martin.weichert/tincxo.html. (M. Pancorbo, Ret-Info)

- La decembra numero de CNT (organo de la anarkiista sindikato) aperigis preskaŭ kvaronpaĝan artikolon, *Esperantlingve*, pri la spertoj de Montpeliera kongresano, kiu pasintjare lernis la lingvon. Hispana E-Federacio gratulis al la gazeto pro la uzo de Esperanto. (M. Parra)

HUNGARIO: Socia influo

- En decembro Hungaria E-Asocio sendis, kun salutletero de HEA-prezidanto György Nanovszky, sian hungarlingvan periodaĵon "Eŭropa Unio kaj la lingva demando" al ĉiuj parlamentanoj. Dekoj da respondantoj esprimis simpatian kaj subtenon al la celoj de HEA. (O. Princz)

- László Gados aperigis 30-paĝan studon "Pri la neceso de pli diferencigita kaj pli klarsenca lingvopolitiko" en la prestiĝa revuo *Gazdaság és társadalom* ("Ekonomio kaj socio").

- La sama Gados atingis ke, kadre de esplorprogramo de la Hungara Akademio de Sciencoj, celanta aŭtentan informadon pri Hungario, oni publikigos en Esperanto parton de la informamaterialo disvastigota. (O. Princz, *Debrecena Bulteno*)

➔ Rezulte de la multaj refutaj reagoj, la 7-an de feb. Dragó senkulpigis sin kaj eĉ anoncis eblon dediĉi elsendon al la Esperanta literaturo. Lia tiama gasto, la fama bild-humoristo Mingote, fiere diris ke lia avo

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

10^A MALFERMA TAGO

sabaton la 24-an de aprilo 1999 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj



Speciala gasto:
MARJORIE
BOULTON

- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

ITALIO: Urba kunlaboro

La Esperanto-Grupo de Florenco aperigis artikolon pri "Internacia lingva komunikado — Tutmondiĝo kaj Eŭropa Unio" en la bulteno de grava kultura asocio de la urbo. (C. Telaretti)



ĜUSTIGO

En januaro (p. 19) glitis eraro en citaĵon de Oszkár Princz. Fakte, laŭ li "en Hungario [...] en la pasintaj 40 jaroj vendiĝis pli ol 200 mil lernolibroj", do ne "pli ol 20 mil".

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotozo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- *Kontakto*;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Dašgupto,
Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin.
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 41,75 eŭroj
Institucia abono: 88,50 eŭroj
Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Robert ALBERG (1912-1999), delegito pri usona historio, la hebrea lingvo kaj lingvistiko en Tel-Avivo (Israelo), mortis la 9-an de januaro. Li tradukis la romanon *Sep fratoj* de la finno Aleksis Kivi el Esperanto en la hebrean.

Janus Di CENSO (1928-1998) forpasis en Sulmona (Italio) la 18-an de decembro. Lerninte Esperanton meze de la 80-aj jaroj, en 1994 li aperigis la ampleksan libron *Trasermo* pri lingvaj "evoluiĝoj" kiujn li konsideris necesaj. Fervora latinisto, li recenzis por nia revuo *La latina kiel interlingvo* (jul.-aŭg. '96, p. 134).



Lambertine DRÈZE (1911-1999), esperantistino 70 jarojn, regula kongresano de 1935, komitatano de UEA (1980-86), kiu prezidis la valonian Asocion por Esperanto (1984-88),

mortis la 9-an de januaro en Lieĝo (Belgio).

Les EASON (1927-1998), iama (1964-87) delegito en Cardiff (Britio), forpasis la 4-an de decembro.

Ĉedomil HUBER (1920-1999), iama prezidanto de Serbia E-Ligo kaj de la Beograda E-societo Radomir Klajić, komitatano de Jugoslavio E-Ligo, LKK-membro de la 58-a UK (Beogrado, 1973), mortis la 1-an de januaro, tagon antaŭ ol li devus vojaĝi al Zagrebo por atesti en proceso kontraŭ la eksĉefo de la koncentrejo Jasenovac, en kiu li pasigis du jarojn dum la dua mondmilito.

Paul KÖSTER, kiu dum multaj jaroj prezidis la E-grupon en Rostock (Germanio), mortis la 3-an de decembro 1998.

Cathy SCHULZE (1913-1999), Honora Membro de UEA ekde 1986 kaj de la usona landa asocio ELNA, delegito, forpasis la 14-an de februaro en Hillsborough (Kalifornio).

Ŝi naskiĝis la 4-an de novembro 1913 en New London (Konektikuto) kaj eklernis Esperanton en 1939. Poste, en Kalifornio, ŝi instruis la lingvon en publikaj lernejoj kaj popolaj kolegioj. Sole en la jaroj 1983-85 ŝi havis 1973 gelernantojn en dekleciana poŝta kurso. Dank' al ŝia konvinkokapablo, Esperanto estis enkondukita en multajn lernejojn de la San-Franciska regiono, kies Esperanto-organizon SFERO ŝi servis kiel sekretario kaj redaktoro de ties bulteno (1956-98).

Ŝi kaj ŝia edzo William Schulze, forpasinta en 1993, financis kaj direktis (1964-74) en la propra hejmo la informcentron kaj libroservon de la tuta usona movado — ĝis transdono

al ELNA, kiam tiu malfermis sian centran oficejon. Ŝi laboris por ELNA kiel estrarano, poste vicprezidanto (1972-75) kaj redaktoro (1978-86) de ties revuo *ELNA Newsletter*. Ŝi estis sekretario de la interlingvistika fondaĵo Esperantic Studies Foundation.

La vivoverko de Cathy Schulze apogeis per la Somera E-Kursaro ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko, kiun ŝi iniciatis kaj ĝisfine flegis. La kursoj startis en 1970, kaj en ili ĉiujare duoncento da plej diverslandaj kursanoj ricevis instruon de plurdekoj da elstaraj E-pedagogoj, -aŭtoroj kaj aliaj elstaruloj, de William Auld ĝis, atendeble, Mark Fettes, Joel Brozovsky kaj Atilio Orellana Rojas en la 30-a kursaro, okazonta ĉi-somere.

Laŭ ELNA-prezidinto Duncan Charters, "neniu alia individuo [ol Cathy Schulze] havis pli gravan rolon en la progresigo de Esperanto en Usono dum la lastaj jardekoj."



Arkivo de UEA

Tadeusz MARKOWSKI (1906-1998) forpasis en Lodzo la 12-an de septembro. Li adaptis por Pola Radio plurajn teatraĵojn, reĝisoris ĉiujn Esperantajn disaŭdigojn de la Lodza radio, tradukis polan poezion kaj la dramon *Kataki* — *malamiko*, prezentitan en tri Universalaj Kongresoj.

MIYAMOTO Sinzi (1905-1998), dumviva membro, delegito en Kobe (Japanio) de 1951 ĝis 1995, forpasis la 31-an de marto 1998.

Robert MORAUD (1909-1998), tre agema inform-aktivulo, kiu fondis kaj gvidis Agad-Grupon por Esperanto, mortis en St-Yreix (Francio) la 5-an de oktobro.

Roger VAN HUMBEECK (1932-1998), aktivulo en la jaroj 50-aj kaj 60-aj, kunfondinto de Belga E-ista Junulara Asocio kaj de la revuo *Koncize*, gvidinto de perfektigaj kursoj en Bruselo kaj Antverpeno, forpasis en Wemmel (Belgio) la 18-an de novembro.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependerry@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio;


☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

Verkoj de Zlatko Tišljar

Neeviteblaj por ĉiuj, kiuj deziras kompreni la rilaton inter la Esperanto-movado kaj la mondo.



1. Ĉuropa ideologio.

Verko premiita ĉe la Belartaj Konkursoj 1998. Ege pozitive recenzita de neesperantistaj slovenaj universitataj profesoroj. Aperis jam la slovena kaj germana tradukoj. La verko malfermas novajn perspektivojn por Esperanto kaj klarigas la rilaton inter identecoj, ideologioj kaj lingvoj. 6,90 eŭroj.

2. **Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj.** Eĉoj pri la esperantista popolo kaj sciencaj verkoj analizantaj la facilecon de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj. 12,30 eŭroj.

Mendu ĉe **Inter-kulturo:**

Besednjakova 1, SLO-2000 Maribor, Slovenio.

Fax: +386-62-100669.

Triona rabato por minimume 4 ekz. de la sama titolo.

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO.

Heidi Suonuuti. El la angla trad.

Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke.

Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3.

21 cm. Prezo: € 5,45.

Triona rabato ekde 3 ekz.



Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino estas multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj funkciulo de ISO, Internacia Organizaĵo por Normigado. La originalo estis verkita laŭ komisiono de Nordterm, asocio de terminologiaj societoj en Nordio.

Belega glumarko

kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam en la Montpeliera UK kaj furore vendiĝis. Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ

Berlino. Mendebila ĉe la Libroservo de UEA: € 2,70 po unu folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.



LA RADIKOJ DE EVOLUO



La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipe en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo – klerulo kaj eksdiplomato el Trinidado kaj Tobago – tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.

“Evoluo povas prosperi nur se ĝi havas radikojn en la kulturo kaj tradicio de la koncerna lando.” (p. 15)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: € 6,80.

POR SUKCESI EN EKZAMENO



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA.

Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Dua eld. Rotterdam: UEA/ILEI, 1998.

34p. ISBN 92 9017 055 7. 21 cm.

Prezo: € 3,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA mezuras la kapablon uzi Esperanton en praktiko. Centoj da esperantistoj jam ekzameniĝis kun sukceso je elementa aŭ meza nivelo. Tiu ĉi gvidilo helpas novajn kandidatojn por prepari sin por ekzameno. La postularo kaj regularo klarigas la formalan bazon de la Internaciaj Ekzamenoj. Specimenaj testoj de la du niveloj konigas la praktikan funkciadon de la ekzamenoj.

La libreto taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj.

Trinku ankaŭ vi el la akvoj de nia Fonto

Unu el la plej riĉaj libro-katalogoj estas tiu de Fonto.

Pli ol 80 libroj, originalaj aŭ tradukitaj, bone, bele kaj kompetente eldonitaj, plus 18 jarkolektoj de la monata beletra revuo FONTO.

Prestigiaj verkoj kiel Rikolto, La Luzidoj, Sed nur fragmento, Cent jaroj da soleco, Antologio Latina... kaj la furorantaj verkoj Lasu min paroli plu, Ili kaptis Elzan, Gerda malaperis, Vere aŭ fantazie, de Claude Piron, kaj multaj aliaj, troviĝas en tiu katalogo, senpage liverebla de



Brazila Esperanto-Ligo

Ekskluziva distribuanto de Fonto

Caixa Postal 03625

70084-970 Brasília-DF

Brazilo

Fakso: 55 061 226 4446

Telefonnumero: 55 061 226 1248

bel@esperanto.org.br

Specialaj kondiĉoj por
libroservoj kaj
ceteraj revendistoj

Por senpage ricevi la katalogon, bonvolu sendi vian poŝtan aŭ retadreson.

Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindeko de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis versajne centojn da libreccenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literatur-esplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)




La libro estas aranĝita en kvar sekcioj:
Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo.
Tre bela grafika prezento.

PAJLEJOJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld.
 Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: € 19,05.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ


Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

**SESA ELDONO
 DE LA
 INTERNACIA
 LERNOLIBRO**




Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: € 10,90.
 Sonkasedo: € 5,45. Triona rabato ekde 3 ekz.

E. A. EKKER / D. EISENBURGER:

Franz Schubert Muzika albumo

Bela, bindita, plenkolora
 ilustrita 28-paĝa libro,
 plus 60-minuta kompaktdisko.

Eldonejo KLEKS, 1997. Prezo: € 24,60.
 Nur libro (sen disko): € 13,60.
 Triona rabato ĉe UEA ekde 3 ekz.



**MULTKOLORA GLUMARKO IGAS VIAJN
 KOVERTOJN PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!**

Prezo de folio (12 glumarkoj): € 1,35.
 Triona rabato ekde 3 folioj.